

EL POPOLA ĈINIO

中國新道

4

1978





Bone kreskas la hibridigita rizo kulturata en Hengŝan-gubernio de Hunan-provinco.

Hibridigita rizo

Ĉinaj agronomoj sukcesis elkulturi hibridigitan specion de rizo, kiu povas doni multan produktokvanton. Nun tia rizo jam estas vaste kulturata en multaj provincoj en suda Ĉinio. La kulturado montris, ke la produktokvanto de la rizo estas je 20 ĝis 30 procentoj pli granda ol tiu de lokaj specioj.




Membroj de scienca grupo pesas spikon de tia rizo



Teknikistoj observas kreskadon de la hibridigita rizo

La spiko de la hibridigita rizo estas pli granda, pli longa kaj pli multgrajna ol tiuj de la gepatraj rizplantoj.



母本
♀

父本
♂

杂交稻
F₁



MALALTA POMARBO

Novaj specoj de frue maturaj ruĝaj kaj verdaj pomoj banangustaj

Laborantoj de la Hjuĝou-a Pomarba Ĝardeno de Giangsu-provinco faris eksperimentojn pri greftado de pomarbidoj al baztrunkoj de diversaj malaltaj pomarboj en sia kulturejo, kaj sukcese plantis malaltajn pomarbojn en sablejo de la malnova fluejo de la Flava Rivero.

En la lastaj tri jaroj, tiu ĝardeno kulturis pli ol cent mil diversspecajn malaltajn pomarbidojn uzeblajn kiel baztrunkojn, liveris greftaĵojn de diversaj malaltaj pomarboj al aliaj provincoj kaj renovigis la stucan teknikon de pomarboj. La malaltaj pomarboj de tiu ĝardeno ekfloras kaj fruktodonas en la dua jaro post transplantado el la arbida bedo, kaj en la sepa jaro ĉiu muo (= 1/15 hektaro) da tiaj pomarboj jam povas doni pli ol 2,000 kilogramojn da pomoj. La superecoj de tia malalta pomarbo estas malgranda arbokapo, frua fruktodono, granda produktokvanto kaj taŭga por densa plantado kaj meĥanizita flegado.

La frukto de tia pomarbo enhavas relative multe da sukero, estas bongusta, brilkolora kaj longe konservebla.




Teknikistinoj faras greftadon en bedo de malaltaj pomarboj.

Spertintersaĝo de
sciencaj laborantoj el
diversaj lokoj



Ŝprucigado de insek-
ticido



Observado kaj preventado de fiinsektoj en nokto



Promesplenaj

Ekstermi

Fotoj de Vang Jonglu

afidojn per kokcinoj



Observado pri la vivo de kokcinoj por pli bone bredi ilin.

Sucun-brigado de Jangĉeng-gubernio de Ŝanhi-provinco okupiĝas ĉefe pri kulturado de kotonplantoj. Ekde 1974, ili ekstermadas afidojn per kokcinoj kaj plialtigis la produktokvanton de kotono de la tuta brigado. Tiu metodo kontraŭ fiinsektoj malutilaj al kotonplantoj estas malmultekosta, facile praktikebla kaj bonefika.



Observado pri afidoj



Allogi fiinsekojn per nigraluma lampo por ilin ekstermi



Studo pri ekster-
mado de fiinsek-
toj

Riĉa rikolto de kotono



EL POPOLA ĈINIO

中國報道

1978
N-ro 4
(235)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILO:

- P.1. Mu Gujing, ludata de aktorino Jang Kiuling, en la pekina opero "Heroinoj de Jang-familio"
- P.4. Printempo Venas al Suda Ĉinio (Ĉinstila pentraĵo)
de He Genkiang




Enhavo

La elektronika industrio en rapida disvolviĝo	2
La elektronika industrio de Giangsu	6
Juna teknika renovigisto	11
Rememoroj pri Ĉina Proleta Esperantista Unio	14
Georfoj sub bona zorgo	17
"Heroinoj de Jang-familio" revenis al la scenejo	21
Nokto de Gongguancun	23
Diligentaj ĝardenistoj	26
Kanto de la Juneco (<i>Daŭrigo</i>)	29
Pekino, urbo kun longa historio	34
HISTORIAJ OBJEKTOJ: La antikva ceramiko de Ĉinio	38
AMIKECO: Noto pri vizito al Irano	41
INTER NI	43
KURANTAJ AFEROJ	44

La elektronika industrio en rapida disvolviĝo

EN la lastaj pli ol 20 jaroj, la nove starigita elektronika industrio de Ĉinio jam disvolviĝis paŝon post paŝo en relative perfektan industrian branĉon de la nacia ekonomio. Nun nia lando povas projekti kaj produkti kompletojn de radaro, telekomuniko, telegvidado, televido, brodkasto, komputero kaj aliajn elektronikajn ekipaĵojn. La duonkondukantaj elementoj, integraj cirkvitoj, vakuaĵaj partoj kaj diversaj elektronikaj elementoj, bezonataj en produktado de la supre menciitaj ekipaĵoj, estas produktitaj ne nur komplete en la lando, sed ankaŭ eksportitaj ĉiam pli multe.



La bazo de nia elektronika industrio estis tre malforta. Antaŭ la Liberigo, en la regionoj regataj de Kuomintango troviĝis nur kelkaj riparejoj de radioaparatoj, kaj tiam eĉ simplaj elementoj de radioriceviloj devis esti importitaj. En la liberigitaj regionoj oni fondis kelkajn fabrikojn de telekomunikaj ekipaĵoj sin apogante sur propraj fortoj. Prezidanto Maŭ Zedong persone faris skribajon por kuraĝigi laboristojn kaj soldatojn disvolvi kreivon, venki malfacilojn kaj mem fari telekomunikajn ekipaĵojn. Per limigitaj krudmaterialoj kaj maŝinpartoj kaptitaj en la milito, ili prove faris kaj produktis telekomuni-



Radituŝa Mikroskopo

kajn aparatojn, generatorojn funkciigatajn per manoj, telefonojn kaj brodkastajn aparatojn, por plenumi la bezonon de la trupoj en la milito. Tio ankaŭ kulturis teknikistojn por disvolvi la elektronikan industrion de la nova Ĉinio.

Post sia fondiĝo la nova Ĉinio donis grandan atenton al disvolvo de elektronika industrio. Ekde la Unua Kvinjara Plano de Disvolvo de la Nacia Ekonomio, laŭplane stariĝis nombro da elektronikaj fabrikoj kaj institutoj, kaj instaligis en altlernejoj fakoj de elektronika tekniko. Ĉio tio metis unuapaŝan bazon por disvolvi la elektronikan industrion. En la jaro 1958 aperis granda antaŭensalto de nia nacia ekonomio, kaj leviĝis tajdo de grandskala disvolvo de elektronika industrio. Sed poste, pro malhelpo de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, la elektronika industrio progresis ne tiel rapide. En la Granda Proleta Kultura Revolucio nia elektronika industrio denove akiris viglan disvolviĝon. Samtempe kun konstruado de nombro da grandaj elektronikaj entreprenoj fondiĝis miloj da mezaj kaj malgrandaj. La produkta povo de diversaj elektronikaj ekipaĵoj, instrumentoj, elementoj ktp. rapide grandiĝis. Nun, 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj ĉiuj havas siajn elektronikajn entreprenojn, kaj multaj lokoj jam



Supre: Linia akcelilo aplikata en kuracado de tumoro.

Malsupre: Kuracisto observas per televidilo la kuracadon en la direktejo.



Brodmaŝinoj procede re-gataj per fotoelektra aparato

povas liveri kompletan da elektronikaj produktaĵoj.

En la lastaj pli ol 10 jaroj, altiĝis senĉese la nivelo de niaj elektronikaj produktaĵoj. Komputero de integra cirkvito kun kalkulkapablo de miliono da fojoj en ĉiu sekundo jam delonge estas produktita, kaj nun oni esploras kaj provfaras pli altrapidan komputeron. Diversspecaj grandpovaj brodkastaj elsendiloj estas pogranda produktitaj. Nia lando jam sukcese aplikis memfaritajn elektronikajn ekipaĵojn al lanĉo, sekvaĉo, telemesurado kaj resurterigo de artefarita ter-satelito. En la jaroj 1975 kaj 1977 Ĉinio konstruis surterajn staciojn de analoga kaj cifera sputnika komunikado. Ankaŭ nia televida industrio rapide disvolviĝis. Depost la jaro 1970, nia lando sukcese faris kompletojn de kolor-televidaj brodkastaj ekipaĵoj inkluzive de telekamero, vidajregistrilo, televid-transsenda veturilo kaj televid-elsendilo, diversspecajn transistorajn nigrajn kaj kolorajn televid-ricevilojn, fotografian televidilon kaj televidilon de fermita cirkvito kaj specialajn televid-ekipaĵojn.


En disvolvo de la elektronika industrio nia lando dependas de la du aktivecoj de la centra kaj lokaj registaroj, kaj praktikas la principon de starigo de grandaj, mezaj kaj malgrandaj entreprenoj en kombino kaj apliko de modernaj kaj indiĝenaj metodoj en produktado. Dank' al tio nombro da malgrandaj fabrikoj, kiuj faris nur simplan prilaboradon, sin turnis en elektronikajn

entreprenojn. Ekzemple, la Tonggiang-a Transistora Fabriko de Harbino estis konstruita de 7 laboristoj, kiuj riparitis plastajn pluvovestojn. En la lastaj jaroj ili fabrikis transistorojn, multigis iliajn specojn ĝis 41 serioj kaj pli ol 400 tipoj kaj kreskigis ilian produktokvanton jaron post jaro. Iuj el iliaj produktaĵoj jam atingis internacian avangardan nivelon, pro tio la fabriko fariĝis unu el la avangardaj entreprenoj de nia elektronika industrio. La Juetan-a Fabriko de Duonkondukantaj Ekipaĵoj en la okcidenta kvartalo de Pekino estis malgranda riparejo de pesiloj funkciigata de loĝkvartalo kaj transformiĝis en la nunan fabrikon en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ĝi produktis grandan kvanton da gravaj elektronikaj ekipaĵoj — siliciregaj difuzfornoj, kies ĉefaj teknikaj normoj atingis la internacian avangardan nivelon, kaj ĝi provizis per siaj produktaĵoj pli ol 20 provincojn, municipojn kaj aŭtonomajn regionojn.

Por solvi malfacilajn problemojn en produktado, la diversaj branĉoj de elektronika industrio de nia lando disvolvis inter si socialisman kunlaboron. Pekino, Ŝanhajo, Tiangin kaj Ĝiangsu en kunlaboro fabrikis duonkondukantajn elementojn kaj grandskalajn integrajn cirkvitojn, elfaris avangardajn produktaĵojn kaj atingis grandajn sukcesojn en produktado de novaj elektronikaj materialoj. En la pasintaj kelkaj jaroj, kunlaborante kun aliaj fabrikoj, institutoj kaj altaj lernejoj, pli ol 10 elektronikaj fabrikoj de la urbo Ŝigiaĝuang de Hebej-provinco produktis ĉ. 100 specojn de elektronikaj produktaĵoj, inkluzive de silicia solkristalo, grandpova regebla silicio, specialaj transistoroj, komputeroj, nigraj kaj koloraj televidiloj kaj medicinaj elektronikaj instrumentoj kun avangarda nivelo. Nun la elektronika industrio de Ŝigiaĝuang marŝis en novan etapon.

La laboristoj kaj oficistoj de nia elektronika industrio klopodas por altigi la teknikan nivelon en produktado. Ili faris gravan paŝon en duonaŭtomata kaj aŭtomata produktado, aplikante novajn teknikojn de elektrona fasko, jona fasko, ultrasonaj ondoj, laserradioj kaj transruĝaj radioj, novan teknologion de prilaborado kun malmulta detranĉaĵo aŭ sen detranĉaĵo kaj specia-

Direktado de elektrostacio per komputero



Meteostacio ricevas nubobildojn per elektronika aparataro. La foto ĉe la supra dekstra angulo montras la antenon.




lajn altetikajn kaj multuzajn ekipaĵojn de ciferoindikado kaj aŭtomata procedregado. La Nankina Radioaparata Fabriko sukcese kreis per unu jaro novajn teknologiojn kaj ekipaĵojn de proceda regado, aŭtomatajn indikatojn, modernajn veldaparatojn kaj aparatojn por multflanka mezurado, kaj starigis duonaŭtomatan produktan linion de radioriceviloj, tiel ke la produktokvanto de la bone akceptataj radioriceviloj "Pando" multe kreskis kaj ilia kvalito pliboniĝis.

Kun disvolviĝo de nia elektronika industrio, la elektronika tekniko estas vaste aplikata en diversaj branĉoj de la nacia ekonomio kaj la nacidefenda konstruado. En agrikulturo, fiŝado kaj forstokulturo k.s. oni uzas la teknikon por trakti semojn, analizi grundon, serĉi akvofonton, prognozi hajlon, ekstermi fiinsektojn, sekigi grenon, kotonon, teon kaj tabakon, mezuri sunlumon, akvoentemon kaj temperaturon, sondi fiŝarojn, bredi dombirdojn, preventi fajron en arbaro kaj kuraci brutojn, kaj ricevis bonajn rezultojn. En industrio estas pli vaste uzata la tekniko, ekzemple en cifera kaj proceda regado de diversaj ilmaŝinoj, reguligado de tensio per regebla silicio, rektifikado kaj aŭtomata proceda regado

en produktado de nafto, kemiaĵoj, fero, ŝtalo kaj malpezaj industriaĵoj, kaj en diversaj komputeroj, telekomunikiloj, ondportaj aparatoj, ultrasonaj difektosondiloj, aparatoj por mezuri temperaturon per transruĝaj radioj, lasera distancmezurilo kaj cifera rapidecmezurilo. Dank' al apliko de tiu tekniko multe da elektro kaj homfortoj estas ŝparitaj kaj la nivelo de aŭtomata produktado estas altigita. La elektronika tekniko estas aplikata kun bona rezulto ankaŭ en trafiko, komerco, kulturo, eduko, medicino kaj higieno.

Nia elektronika industrio kvankam atingis grandajn sukcesojn, tamen ĝi ankoraŭ devas iri certan vojon por atingi la mondan avangardan nivelon. Prezidanto Hua Guofeng montris: "Disvolvigu la revolucionan spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto, rapidigu la paŝojn de la elektronika industrio kaj klopodu por atingi la pinton de elektronikaj scienco kaj tekniko." Sub inspirado de la vortoj de Prezidanto Hua la laboristoj kaj oficistoj de nia elektronika industrio decidis pene batali por efektivi tiun celon kaj fari sian kontribuon por modernigi la industrion, agrikulturon, sciencan kaj teknikon, kaj nacidefendon de nia lando.



Laboristinoj de la Ĉangĝoŭ-a Transistora Fabriko produktas integrajn cirkvitojn.

La elektronika industrio de Giangsu

de EPĈ-RAPORTISTO

EN la 10-a n-ro de 1974, EPĈ publikigis artikolon pri la elektronika industrio de la urbo Ĉangĝoŭ. En la lastaj jaroj, ne nur Ĉangĝoŭ faris novajn paŝojn en la elektronika industrio, sed ankaŭ aliaj lokoj de la provinco Giangsu, al kiu apartenas Ĉangĝoŭ, vigle disvolvis tiun novan industribranĉon. Profundan impreson pri tio mi ricevis dum mia dusemajna vizitado al la suda kaj norda partoj de tiu provinco. De tiu faceto oni povas vidi la klopodojn faritajn

de la popolo de tiu provinco en la nova tajdo de socialisma konstruado.

La ŝanĝiĝo de la Nankina Radioaparata Fabriko estas miniaturo de la disvolviĝo de la elektronika industrio de Giangsu-provinco. Kiam mi vizitis la fabrikon, teknika konsilanto Hu Ginlun, kiu laboris tie preskaŭ 40 jarojn, diris al mi: "La rudimento de la Nankina Radioaparata Fabriko estis la Fabriko de Radioaparataj Elementoj sub la Komisiono de Riĉfontoj de Kuo-

mintango. Krom produktado de malmulte da malgrandpovaj radiogramaj elsendiloj, ĝi ĉefe sin okupis per muntado de radioriceviloj por la usona kompanio Philco. En tiu tempo ankoraŭ aliaj tri similaj fabrikoj troviĝis en Nankino, kaj ĉiuj ili formis la bazon de la elektronika industrio de Giangsu ĉe la Liberiĝo.” En la komenca periodo post la Liberiĝo, la nomita fabriko projektis kaj fabrikis la unuajn armeajn radiostaciajn aparatojn de nia lando por subteni la militiron de ĈPLA al la Sudokcidento kaj la Kontraŭusonon Militon por Helpi Koreion. En la 11-a de januaro, 1956, Prezidanto Maŭ inspektis tiun fabrikon kaj tio multe stimulis ĝiajn laboristojn kaj oficistojn. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, tiu malgranda fabriko jam disvolviĝis en grandan elektronikan entreprenon, kiu povas projekti kaj fabrikigi multajn specojn de radioaparatoj.

En la lastaj jaroj, la Nankina Radioaparata Fabriko donis helpon al pli ol 110 novaj radioaparataj fabrikoj, el kiuj iuj ricevis de ĝi senditajn gvidantajn kadrojn, teknikistojn, laboristojn kaj mezurajn instrumentojn. Ĝi ankaŭ liveris elektronikajn ekipaĵojn al pli ol dek landoj. En la jaro 1975, sub la helpo de koncernaj institucioj, tiu fabriko sukcese muntis la unuan surteran stacion de sputnika komunikado kaj per tio nia elektronika tekniko eniris tiun novan teknikan kampon.

Giangsu nun havas pli ol 340 elektronikajn fabrikojn kaj laborejojn, dislokiĝantajn en pli ol 50 urboj kaj gubernioj sude kaj norde de Jangzrivero, kaj fariĝis unu el tiuj provincoj kies elektronika industrio disvolviĝas relative rapide.

En Ĉangĝoŭ, mi vizitis la fabrikon de elektraj motoroj por telekomuniko. Antaŭe ĝi estis malgranda fabriko neatentata. En 1959, post kiam ĝi transformiĝis de faruneja riparejo en fabrikon de elektraj motoroj, ĝi povis produkti nur simplajn elektrajn motorojn. Sed nun ĝi jam produktas paŝo-post-paŝan motoron, kiu estas grava elemento en procedrega sistemo.

Ĉen Libi, kiu estis nomumita kiel inĝeniero de Ĉangĝoŭ antaŭ nelonge, estas unu el la ĉefaj projektantoj de paŝo-post-paŝaj motoroj de tiu fabriko. Li diris al mi: “En 1964, kiam ni ricevis la


taskon fabrikigi paŝo-post-paŝajn motorojn, niaj ekipaĵoj kaj teknikaj kondiĉoj estis tre malbonaj. Tiam ankaŭ mi ne multe sciis pri tiu maŝino. Multajn malfacilojn ni devis venki en la prova fabrikado. Sed ni pensis, ke kontribui al la disvolvado de nia industrio ja estas nia devo, kaj ni ĝojis, ke nia fabriko komencis projekti motoron de avangarda tekniko. Rapide fondiĝis speciala grupo en nia fabriko por studi eksterlandajn avangardajn teknikojn kaj fari samtempe projektadon laŭ la bezono kaj produktaj kondiĉoj de nia lando. Post multfoja provado, fine ni sukcesis elfari tian motoron en 1965.”

Sekve de la disvolviĝo de nia elektronika industrio kaj la senĉesa altigado de aŭtomatigo en ĉiuj industriaj branĉoj, ĉiam pli grandiĝis la bezono de paŝo-post-paŝaj motoroj. En la lastaj jaroj, la fabriko klopodis plimultigi la specojn kaj grandigi la kvanton de la produktaĵoj. Nun ĝi jam povas produkti preskaŭ ĉiujn tipojn de reakciaj paŝo-post-paŝaj motoroj kaj parto de iliaj normoj jam atingis la avangardan nivelon de nia lando. Ĝiaj produktaĵoj estas vaste aplikataj en aŭtomataj presado, gravurado, fotado kaj memregata maŝino kaj nacidefenda industrio.

En negranda fabriko de Ĉangĝoŭ, mi vidis ke laboristoj muntas tubliniojn en iu nova etaĝdomo. La akompananto diris al mi, ke ĝi estas

Ciferrega ilmaŝino produktita de Ĉangĝoŭ





Reguliĝado de aparatoj en la Nankina Radioaparata Fabriko

nova pura laborejo de la Ĉangĝoŭ-a Transistora Fabriko kun plankareo de 4,500 kvadrataj metroj.

En la supre menciita artikolo de la 10-a numero de 1974, ni raportis pri la Ĉangĝoŭ-a Transistora Fabriko kaj la Dua Radioaparata Fabriko de Ĉangĝoŭ en disvolviĝo. En 1974, la transistora fabriko projektis kaj sukcese fabrikis mezskalan integran cirkvitojn. Por frue komenci pogranda produktadon, la fabriko reformis puran laborejon. Nun ĝi ankaŭ sukcesis fabrikigi grandskalan integran cirkvitojn. La nova pura laborejo servos por pogranda produkto de tiaj mezskala kaj grandskala integraj cirkvitoj.

Ankaŭ en aliaj elektronikaj fabrikoj de Ĉangĝoŭ oni povas vidi novajn produktadojn. La totala produktovalorado de la elektronika industrio de tiu urbo kreskas ĉiujare. Eĉ en la jaro 1976, kiam la ĝenado kaj subfoso de la "kvarpersona bando" estis tre seriozaj, al totala produktovalorado de ĝia elektronika industrio kreskis je 20.2% kompare kun tiu de 1975. Kaj tiu de 1977 pligrandiĝis je 24.14% kompare kun tiu de 1976. En la kuranta jaro, kredeble novaj antaŭenpaŝoj estos faritaj.

En la disvolvado de la elektronika industrio de Giangsu-provinco, ankaŭ Nantong ludis rimarkindan rolon. Tiu urbo situas ĉe la norda

bordo de la malsupra parto de Jangzi-rivero kaj veturante de Nankino per ŝipo oni povas ĝin atingi post ĉ. 10 horoj.

En la pasinteco, Nantong havis nenian elektronikajn industriojn. Antaŭ la kultura revolucio, tiu urbo havis nur riparejojn de radioaparatoj. Nun ĝi jam havas 14 elektronikajn fabrikojn kaj unu instituton, kiuj povas produkti multajn specojn de radioaparatoj, mezuriloj, elektronikaj aparatoj bezonataj de diversaj laborkampoj, duonkondukantaj kaj radioaparataj elementoj. Ekde 1972, la totala produktovalorado de la elektronika industrio de tiu urbo kreskis meznombre je 40.6% ĉiujare, kaj la elektronika industrio jam fariĝis grava konsistiga parto de la industrio de Nantong.

En la Nantong-a Dua Fabriko de Radioaparataj Elementoj, mi vidis novan etaĝdomon servantan kiel laborejo kaj ankaŭ la matobudon, kiun oni uzis kiel laborejon en la komenca periodo. Mi vidis preĝmaŝinojn regatajn de komputero, dratotranĉan ilmaŝinon kaj aliajn modernajn ekipaĵojn kaj ankaŭ simplan frotmaŝinon en la komenca periodo de la fabriko. Ili konkrete montras la vojon iritan de tiu fabriko en sia disvolviĝo.

En la pasintaj 11 jaroj, la Nantong-a Dua Fabriko de Radioaparataj Elementoj ne ricevis investon de la ŝtato. Ĝi persiste disvolvis la amasan movadon de lerno de Daking en industrio, produktis 58 specojn de 6 serioj da kontaktiloj por la ŝtato kaj plenumis eksportan taskon de siaj produktadoj. Ĝi jam liveris al la ŝtato tiel grandan sumon da profito, kiu sufiĉas por starigi 9 tiajn fabrikojn.

Kamarado Tian de la Elektronika Buroo de Nantong diris al mi: "La relative rapida disvolviĝo de la elektronika industrio de nia urbo en la pasintaj dek jaroj dependas ankaŭ de la kunlaboro kaj subteno de koncernaj unuoj. Ekzemple, la laboristoj de la Nantong-a Transistora Fabriko eĉ neniam vidis transistoron, kiam tiu fabriko estis fondita. Ni sendis laboristojn al alilokaj fabrikoj por lernado kaj dank' al ilia varma instruado de produkta tekniko, ni sukcesis produkti transistorojn en tiu sama jaro. Nun tiu

fabriko jam povas produkti pli ol dudek specojn de integraj cirkvitoj. Antaŭe la radioaparataj fabrikoj de Nantong produktis transistorajn radiatoricevilojn per elementoj produktitaj de aliaj urboj kaj tio estis malfavora al la disvolviĝo de produktado. Por solvi tiun problemon, laŭ nia aranĝo elektronikaj fabrikoj de la urbo produktis por ĝi elementojn kaj nun 80 procentoj de la bezonataj elementoj estas produktitaj en nia urbo. Tiu aranĝo ne nur pliigis la produktokvanton de transistoraj radiatoriceviloj je 30-oblo, sed ankaŭ akcelis la disvolviĝon de fabrikoj produktantaj tiajn elementojn.”

Kaj kun granda intereso mi pririgardis ekzemplojn pri apliko de elektronika tekniko al industrio kaj agrikulturo.


Dum vizito al la Ljusi-a Ŝipkluzo de Kidong-gubernio en norda Gjangsu, ni vidis jenan scenon: Kiam ŝipo venanta de supre eniras la teronon de fotoelektra kontrolado je 100 metroj for de la kluzpordo, la direktejo tuj ricevas signalon pri alveno de ŝipo kaj komencas labori. Kiam la ŝipo eniras la kluzon 175 metrojn longan kaj 12 metrojn larĝan, la supra kluzpordo mem fermiĝas kaj samtempe la direktejo donas signalon, ke la malsupra valvo estu malfermita por ellasi akvon. Kiam la akvonivelo en la kluzo egaliĝas al tiu de la malsupra fluo, la malsupra kluzpordo mem malfermiĝas kaj la ŝipo tuj forlasas la kluzon kaj veturas malsupren. La tuta procedo estas plenumata aŭtomate sen interveno de homo en 7-8

minutoj. Tiu aŭtomata ŝipkluzo estas la unua de nia lando en sia speco, ĝia ekipaĵo por aŭtomata direktado estas projektita kaj produktita de la Elektronika Instituto de Kidong-gubernio.

La Ljusi-a Ŝipkluzo estas la gorgo de la rivera transportado en Kidong-gubernio. 85% de la kotono produktita de la 580,000 muoj (1 muo = 1/15 hektaro) da kampoj kaj granda kvanto da kemia sterko, insekticido kaj aliaj varoj estas tra ĝi transportitaj. En la pasinteco, la kluzo estis manipolata per manlaboro kun malalta efikeco. En 1973, simplaj maŝinoj estis instalitaj al ĝi, tamen la laboristoj ankoraŭ devis penlaboradi multfoje en ĉiu tago kaj ĉiufoja trapasigo de ŝipoj bezonis pli ol 20 minutojn. Por konformigi la ŝipkluzon al la disvolviĝo de la industrio kaj agrikulturo de la gubernio, la Kompartia Komitato de Kidong-gubernio konsentis la proponon de la ŝipkluzaj laboristoj pri aŭtomatigo de la kluzo kaj donis la taskon al la ĵus fondita elektronika studgrupo.

Tiu grupo konsistis el unu laboristo kaj tri intelektaj junuloj venintaj de urbo kaj ilia plej alta nivelo de klereco estis tiu de alta mezlernejo. Konsiderante la bezonon de la ŝtato kaj la popolo, ili decidis kiel eble plej rapide apliki elektronikan teknikon al aŭtomata regado de la ŝipkluzo. Ĉen Likjun, Huang Gianĉi kaj la aliaj du membroj faris esploradon pri la kluzo, pene lernis necesajn sciojn kaj interkonsiliĝis kun la laboristoj por solvi renkontitajn malfacilojn.

La Ljusi-a Ŝipkluzo en laboro



Post laborado de pli ol 3 monatoj, ili sukcese elfaris ekipaĵon por aŭtomata direktado de la ŝipkluzo.


Subtenate de la partia komitato de la gubernio, tiu grupo iom post iom transformiĝis en instituton. Laŭ efektivaj bezonoj en produktado, ili klopodis por apliki elektronikan teknikon en industrio, fiŝbredado, meteologia laboro kaj higiena afero kaj jam atingis ĝojindajn sukcesojn en dek projektoj. Kaj ili faris 8 kompletojn da aŭtomataj ŝipkluzaj direktiloj por aliaj lokoj. En 1975, ili ankaŭ akceptis taskon de la ŝtato fari pli avangardan ekipaĵon por aŭtomata fermado kaj malfermado por granda ŝipkluzo, kaj nun la ekipaĵo jam estas en la stadio de meza eksperimento.

En Kidong-gubernio, mi vidis, ke la malgranda Gianghaj-a Kotonsensemiga Fabriko kun iom pli ol 200 laboristoj aplikis elektronikan teknikon en produktado. En la centra direktejo de tiu fabriko, mi vidis per televida aparato kiel iras la produktado de la kotonsensemiga laborejo.

Gaŭ Hajnian, manipulanto en la direktejo, kiu diplomitiĝis el mezgrada profesia lernejo, estas unu el la ĉefaj teknikaj renovigantoj en la fabriko. Li rakontis al mi pri la projektado kaj

farado de la aŭtomata direktilaro: “En la Kvara Tutlanda Popola Kongreso de 1975, Ĉefministro Ĝou elmetis, en la nomo de Prezidanto Maŭ, al la tutlanda popolo efektivigon de modernigo de industrio, agrikulturo, scienco, tekniko kaj naciodefendo, kio forte stimulis nin. Kidong-gubernio produktas multe da kotono, kaj ĉiujare nia fabriko havas pezan taskon de prilaborado de kotono. Por altigi la produktivon, malpezigi la laboron kaj modernigi nian malgrandan fabrikon, ni devis bonigi la produktan kondiĉon per elektronika tekniko. La partia filio de nia fabriko kaj la laboristoj kaj oficistoj kune faris planon por aŭtomatigi la produktadon en la periodo de 1975 ĝis 1980. Ili ĉiuj laboris kun granda entuziasmo kaj en la unua jaro jam sukcesis elfari aŭtomatan pakmaŝinon. En la lastaj du jaroj, ili sukcesis fari 5 aŭtomatajn ekipaĵojn kaj efektivigis aŭtomatan regadon de la kotonsensemiga laborejo. Ni havas planan memfidon efektivigi nian planon.”

Dank’ al disvolviĝo de la elektronika industrio de Giangsu en la lastaj jaroj, estas pretigitaj la kondiĉoj por disvastigo de elektronikaj teknikoj. Kaj ĉie, kien mi iris, mi vidis ĉiam pli vastan aplikon de elektronika tekniko de diversaj kampoj kun certaj sukcesoj.



Sekigado de drogo per mikroonda kontraŭmikroba aparato en la Nankina Droga Fabriko

Juna teknika renovigisto

EN ĝojo pro bona plenumo de la produkta plano de 1977, kadro de laborejo Maljuna Ĝaŭ kondukis min en ilian puran laborejon. Tie oni produktas 16 specojn de diodoj, triodoj kaj laseraj materialoj.

Ĉe difuzforno, aparato aŭtomate registris la internan temperaturon por serĉi la precizan situon de la areo kun konstanta temperaturo. Maljuna Ĝaŭ diris al mi: “La siliciaj pecoj uzataj en produktado de triodoj unue devas esti traktataj en la areo de konstanta temperaturo en la forno. Antaŭe, la mezurado pri tiu areo estis farita permane, 4-8 horoj estis bezonataj ĉiufoje kaj oni ofte ne povis atingi la postulatan precizecon. Post kiam laboristo Su Juming kreis tiun aŭtomatan mezurilon, la mezura tempo mallongiĝis ĝis 20 minutoj, tiel ke multe leviĝis la produktokvanto kaj kvalito de siliciaj diafragmoj.”

En alia laborĉambro, montrante precizan aparaton, Maljuna Ĝaŭ diris al mi, ke ankaŭ ĝi estis projektita de Su Juming. Ĝi estas ekipaĵo regata de komputero por kontroli la internaĵon de triodoj, kaj la manipulantoj nur metas kaj forprenas la kontrolendajn produktaĵojn je ĉiu dekelko da minutoj. Manipulistino Vang Hiu-ĵing kontente diris al mi: “Tiu aparato multe malpezigis nian laboron. Antaŭe, 16 homoj en du grupoj, pene kaj lace laboris permane. Ili tamen ne povis kontentigi la bezonon de la sekvanta procezo de du produktaj linioj. Nun, nur kvar laboristoj jam sufiĉas por provizi 3 produktajn liniojn.”

La Unua Transistora Fabriko de Ginan, kie laboras Su Juming, estas malgranda fabriko kun nur 460 laboristoj. Tie ni vidis ankaŭ aliajn ekipaĵojn projektitajn de Su Juming, ekz., aŭtomatan aperturofermilon de diodoj kaj aŭtoma-


tan fadenbobenilon. Laŭdire, en lastaj kelkaj jaroj Su Juming faris, kune kun laboristoj, kelkdek teknikajn renovigojn. Tio efike akcelis la disvolviĝon de produktado kaj multe plibonigis laborkondiĉojn, tial oni montris grandan respekton kaj admiron al Su Juming.

Su Juming estas honesta junulo kun kvadrata vizaĝo, densaj brovoj kaj grandaj okuloj. Kiel multaj aliaj avangardaj laboristoj, kiujn mi kontaktis, li ne ŝatas, nek lertas rakonti siajn farojn. Mi informiĝis pri li plejparte de aliaj.

En la jaro 1965, kiam la fabriko estis ĵus fondita, la 16-jara Su Juming estis unu el la 40 fondintoj. Tiam, malbona estis la laborkondiĉo kaj ununura la speco de produktaĵo. Por produkti modernajn elektronikajn produktaĵojn, oni certe ne povas daŭre apliki malmodernan teknologion. Kiel ŝanĝi la staton? Tiam ĝi estis nur fabriketo funkciigata de distrikto de la urbo Ginan, tial ĝi ne povis rekte ricevi de la ŝtato investon kaj ekipaĵojn. Estante la mastroj de la fabriko, la laboristoj decidis memstare krei kondiĉojn por disvolvi la produktadon laŭ instruo de Prezidanto Maŭ. Ankaŭ la gvidantoj de la fabriko instigis ilin lerni sciojn pri produktado kaj fari teknikajn renovigojn.

En sia knabeco Su Juming jam forte interesiĝis pri radioaparatoj sub la influo de sia pliaĝa frato. Sur la vojo al la lernejo, li ofte preterpasis riparejon de radioriceviloj kaj rigardadis tra la fenestro elektronikajn tubojn kaj cirkvitaĵojn riparatajn de laboristoj. Poste, Su Juming ĝoje laboris kiel riparisto en transistora fabriko. Krom bona plenumo de sia laboro, li ofte pripensis prove fari iujn aparatojn kaj ekipaĵojn por la fabriko.

Tamen, liaj unuaj provoj malsukcesis ĉefe pro tio, ke tro malalta estis lia klereco kaj malmulta



Su Juming

lia fundamenta scio pri la elektronika industrio. Depost tiam, la junulo, kiu ankoraŭ ne diplomitiĝis en mezlernejo, komencis sian diligentan lernadon. Li havigis al si matematikan kaj fizikan lernolibrojn de la mezlernejo, kaj krome aĉetis multajn librojn pri fundamenta teorio de la elektronika industrio. En du tutaj jaroj, li preskaŭ utiligis ĉiujn utiligeblajn horojn por studi tiujn librojn.

Ne vana estis lia penado. En la dua duonjaro de 1968, li unufoje projektis kaj fabrikis mezuran aparaton. Antaŭe, por akiri parametrojn de diodoj oni devis fari kelkfojan mezuradon, sed nun nur unufojan per tiu aparato. Kvankam la aparato estis simpla, tamen lia laboro estis laŭdata de gvidantoj kaj laboristoj. Tio multe kuraĝigis lin en teknika renovigado. De tiam, li ĉiujare faris novajn kreaĵojn.

Por fari teknikajn renovigojn, Su Juming daŭre studis fakan scion ne nur pri elektronikaj cirkvitoj, sed ankaŭ pri meĥanismo. Krome li klopodis por povosci teknikojn de tornado, frezado, rabotado ktp. Li povas kaj projektis cirkviton kaj prilabori kaj munti maŝinojn. Liaj teknikaj renovigoj iom post iom altiĝis de simpleco al komplikeco, de malalta al alta klaso.

Unu speco de diodo farita de la fabriko estas grandkvante bezonata de elektronikaj ekipaĵoj. Tamen, plejparto de la procedoj laŭ ĝia tekno-

logio longtempe estis plenumata per manlaboro. Precipe aperturofermado tiel lacigis la okulojn, ke multaj laboristoj devis esti transpostenigitaj pro malboniĝo de vidpovo. Vidante tion, Su Juming multe maltrankviliĝis. Li ofte pensis: Ĉu ni ne povas krei aŭtomaton por liberigi kamaradojn de la okullaciga manlaboro? Laŭ la postulo de disvolviĝo de produktado, la partia organizo de la fabriko decidis radike reformi tiun teknologion, kaj komisiis la taskon al Su Juming.

Estis la unua fojo en nia lando projekti tian aŭtomatan aperturofermilon, tial troviĝis neniu modelo imitebla. Su Juming foje kaj refoje venis al la aperturoferma laborejo por labori kune kun laboristoj. Li atente observadis ĉiun etan movon en la produktado kaj modeste aŭskultis opiniojn kaj proponojn de laboristoj. Samtempe kun tio, li legis multajn librojn kaj materialojn, notis ĉiun eron de utilaj scioj, tiel ke iom post iom formiĝis en lia kapo unuapaŝa projekto.

En multaj teknikaj renovigoj de nia lando kristaliĝis saĝo kaj penlaboro de kolektivo, same en tiu de Su Juming. Ĉu la gvidantoj de la fabriko kaj laborejoj, ĉu la teknikistoj kaj laboristoj multfoje partoprenis en diskutado pri lia projekto kaj elmetis multajn utilajn proponojn. Surbaze de tio Su Juming plurfoje reviziis sian projekton.

En tiuj tagoj Su Juming sinforgese laboris super la projektado ĝis profunda nokto, kaj iam eĉ forgesis preni manĝon. Foje, ferero ĵetita de la prilaboranta maŝino vundis lian okulon. Kuracisto admonis lin ripozi tri tagojn. Sed, kiam li kuŝis sur la lito, la figuro de la petrola laboristo Ferulo Vang aperis antaŭ liaj okuloj. Li pensis, ke Ferulo Vang diris: "Mi preferas vivi malpli longe je dudek jaroj por tutforte konstrui la olekampon!", ja ne gravas lia malgranda vundo, tial li tuj revenis al sia fabriko kaj sin ĵetis en la laboron.

Vidante, ke la filo tiel penlaboras, la gepatroj de Su Juming kaj maltrankviliĝis pri lia sano kaj ĝojis pri lia sindonemo. Lia patro partoprenis en la revolucio en la kvardekaj jaroj kaj batalis

kontraŭ la japanaj agresantoj kaj la Kuomintangaj reakciuloj. Nun li estas sekretario de la partia organizo de iu loĝkvartalo. Li ofte rakontis al siaj gefiloj la pasintajn batalojn kaj per tio stimulis ilin konstrui pli bela la landon liberigitan per sango kaj vivo de la maljuna generacio. Kvankam lia patrino estas dommastrino, tamen ŝi bone komprenis, ke la penlaboro de Juming utilas al la popolo kaj la lando. La tuta familio lin zorgis kaj subtenis, kaj ne ĝenis lin per familiaj bagateloj.

Tiam, kvankam Su Juming tage kaj nokte dro-nis en projektado de malgranda aperturofermilo, tamen li pripensis multe pli ol tion. En paŭzo post la laboro, li ofte parolis kun siaj kamaradoj pri novaj fizionomioj de la fabriko kaj la patrolando aperontaj post modernigo de agrikulturo, industrio, nacidefendo, scienco kaj tekniko. Kun emocia koro li diris al la partia organizo sian deziron aliĝi al KPĈ kaj batali dum la tuta vivo por la komunisma afero.

Tamen, ne ebena estis la vojo de lia antaŭen-marŝo. Sub la influo de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la "kvarpersona bando", iuj diris, ke tio kion tuttage Su Juming faras signifas ĝuste "meti teknikon super politikon" kaj praktiki "produktivismon". Iuj eĉ diris, ke se la partia organizo de la fabriko akceptos Su Juming en la Kompartion, ĝi fariĝos "produkta partio". Sed, Su Juming neniam ŝanceliĝis, kaj multaj kamaradoj lin kuraĝigis kaj la partia organizo lin subtenis. En laborista kunveno de la tuta fabriko, sekretario de la partia ĝenerala filio Jang Hinghua montris: "Su Juming energie laboris dek jarojn, li laboris por socialismo!" En novembro de 1975, Su Juming aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.

Sub la helpo de kamaradoj, en printempo de 1976 Su Juming fine sukcesis elfari la unuan diodan aperturofermilon de nia lando. Dank' al ĝi aperturofermado de diodoj povas esti unufoje plenumita sub regado de elektronika aparato, kiu atingis altan nivelon de aŭtomatigo.

La supera instanco plene jesis la atingojn de Su Juming en la teknika renovigo. Kiel juna teknika renovigisto, li estis elektita kiel repre-

zentanto de la elektronika industrio de Ginan kaj ĉeestis la Tutlandan Kunvenon pri Elektronika Industrio por lerni de Daking en 1977, kaj ricevis la honoran titolon "Eminenta Modelo de la Tutlanda Elektronika Industrio".

Su Juming neniam kontentiĝis pri siaj atingoj. En la pasinta jaro post la frakaso de la "kvarpersona bando", li jam sukcese faris 4 kompare grandajn teknikajn renovigojn. En lia laborejo mi vidis, ke li muntis novan aŭtomatan aperturofermilon kune kun laboristoj, kaj ĝia produktiveco estos 6-7-oblo pli alta ol tiu de la unua. Su Juming kore diris: "Pli bonaj estas la nunaj kondiĉoj ol tiuj en la komenca periodo de nia fabriko. Sed, kun disvolviĝo de la produktado, ankaŭ ĝia aŭtomateco devas esti levita, kaj multaj aferoj estas farendaj por ni."

Su Juming lernas de laboristino en projektado de la aŭtomata aperturofermilo.



Rememoroj pri Ĉina Proleta Esperantista Unio

EN vintro de 1931, inter la kulturaj rondoj de Ĉinio aperis tute nova esperanta grupo — Ĉina Proleta Esperantista Unio (ĈPEU) formita el nombro da junaj revoluciaj esperantistoj.

1931 estis jaro plena de ŝtormoj kaj flamoj en la moderna historio de Ĉinio. Ĝuste en aŭtuno de tiu jaro, la japana imperiismo faris agresan militon kontraŭ Ĉinio, kaj ĝiaj ferhufoj tretis la tri nordorientajn provincojn de Ĉinio. Tiam la reakcia registaro de Kuomintango, kiu zorgis nur ĉirkaŭekstermon de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo, aplikis nerezistan politikon rilate al la agresantoj. La multe suferanta ĉina popolo alfrontis seriozan minacon de pereco de la patrolando. Plenaj de indigno, ili decidis kontraŭbatali. Tiel la kontraŭjapana kaj nacisava movado tajde envolvis la tutan landon.

Ĝuste en tia historia torento ĈPEU naskiĝis en Ŝanhajo.

Tiam Ŝanhajo estis la plej granda industria urbo kaj ankaŭ kultura centro de Ĉinio. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, multaj maldekstraj kulturaj asocioj, ekzemple la Maldekstra Verkista Unio, Maldekstra Dramista Unio, Maldekstra Sociologa Unio, Maldekstra Belartista Unio k.a. prenis ĝin kiel centron de sia aktivado. Kvankam ĈPEU fondiĝis plej malfrue, tamen tuj post sia fondiĝo ĝi viciĝis inter tiuj maldekstraj kulturaj rondoj. Tiam la kuomintanga registaro faris al la Komunista Partio de Ĉinio “ĉirkaŭekstermon” ne nur militan, sed ankaŭ kulturan, kaj kruele subpremis la maldekstran kulturan movadon. Pro tio, tiuj maldekstraj kulturaj rondoj devis sekrete

aktivadi en la blanka teroro, kvankam ili estis nur amasaj organizaĵoj. Sendube, nia ĈPEU ne estis en escepto. Por eviti atenton de kuomintangaj spionoj, ni alinomis, je la komenco, ĈPEU Juna Esperantista Unio.

En januaro de 1932, la japana imperiismo faris nelongdaŭran atakon al Ŝanhajo. La Ŝanhaja Esperanta Asocio, kiu havis longan historion kaj multe kontribuis al la ĉina esperanta movado, estis ruinigita sub kanonado de la japanaj agresantoj.

La japanaj agresantoj kiel negativaj instruistoj edukis ne nur la ĉinan popolon, sed ankaŭ la ĉinajn esperantistojn. La bajoneto de la japanaj militaristoj trapikis pacismon de la ĉinaj esperantistoj kaj ilian belan idealon de homaranismo. Ili ne plu povis vagi sur la vojo de t. n. neŭtraleco. Post kiam Japanio okupis la tri provincojn de la Nordoriento, kelkaj esperantaj organizoj de Ĉinio faris deklaron al la internacia esperanta rondo, en kiu ili indigne akuzis krimojn de la agresantoj. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, ĈPEU pli klare ligis la esperantan movadon kun la batalo de la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj por libero kaj emancipiĝo, tio kondukis la ĉinan esperantan movadon, kiu propre sin apartigis de la realo, sur la ĝustan vojon porti komunan sorton kun la vastaj popolamasoj. En tiu senco, ni povas diri, ke la fondiĝo de ĈPEU markis turnopunkton de la ĉina esperanta movado.

Post sia fondiĝo ĈPEU faris jenajn laborojn: Enlande ĝi eldonis sian organon “Ĉina Proleta

Esperantisto”, propagandis Esperanton inter laboristoj kaj funkciigis kelkajn esperantajn kursojn por ili; ekstere ĝi aliĝis al la Internacio de Proleta Esperantistaro kaj starigis rilatojn kun laboristaj esperantaj organizoj de Japanio, Germanio, Britio, Francio, Hispanio k.a. kaj la tiam ekzistanta Sovetrespublikara Esperantista Unio. Niaj laboroj ricevis varman resonon en kaj ekster la lando, precipe Internacio de Proleta Esperantistaro kaj progresaj esperantaj organizoj de diversaj landoj donis al ni grandan subtenon. Tiamaniere, ĈPEU havigis al si bonan komencon. Sed post nelonge ni rimarkis, ke por ni, malmultaj homoj, kiuj sin limigas en malgranda rondo kaj laboras per sekreta maniero, estas malfacile disvolvi laboron grandpaŝe. Kaj ni vidis, ke kiel unu speco de lingvoj, Esperanto ne havas en si politikan karakteron, kaj ni havis sufiĉajn kondiĉojn por publike aktivadi per ĝi. Ni do funkciigis esperantan korespondan kurson en la nomo de iu membro de la unio. La aktivado tamen estis certgrade limigita. Por disvolvi nian laboron en pli granda skalo ni devis publike funkciigi kursojn, eldoni presajojn kaj fondi publikan esperantan organizon.

Por atingi tiun celon, ni okazigis esperantan ekspozicion en Ŝanhajo en vintro de 1932. Tio okazis unuafoje en la historio de la ĉina esperanta movado. Kvankam la ekspozicio estis malgranda kaj ĝia enhavo ne tre riĉa, tamen ĝi multe interesis la publikon kaj altiris al si multajn rigardantojn. Samtempe kun la okazo de la ekspozicio aperis ankaŭ nia revuo “La Mondo”.

Per tiuj laboroj ni unuigis multajn esperantistojn. Do, post mallonga preparado fondiĝis la Ŝanhaja Esperantista Ligo en januaro de 1933. La fondiĝo de la ligo multe vigligis nian movadon. La ligo luis laŭ ni relative grandan domon kiel sian sidejon, kiu liveris favorajn kondiĉojn por fondi esperantajn kursojn. La ligo ofte organizis kunsidojn, studrondojn, ekskursojn k. a. por praktiki Esperanton kaj intimigis rilaton inter membroj de la ligo.

Krome, ni kolektis malgrandan sumon da mono por fondi malgrandan librejon, kiu vendas



La aŭtoro

krom ordinarajn esperantajn librojn, ankaŭ “Komunista Manifesto” de Marks kaj Engels, “Ŝtato kaj Revolucio” de Lenin, “Fundamentoj de Leniismo” de Stalin kaj aliajn revoluci-tendencajn librojn tradukitajn en Esperanton. Tiuj libroj en la ĉina traduko estis siatempe neaĉeteblaj kiel “malpermesitaj libroj”. Tiam Eldon-kooperativo por Revolucia Esperanta Literaturo (Berlino) planis eldoni “Elektitajn Verkojn de Lenin” kaj ni varbis por ĝi nemalmultajn antaŭmendintojn en Ĉinio. Estis tre bedaŭrinde, ke la plano ne realiĝis pro sursceniĝo de Hitler kaj subpremado al la germana esperanta movado.

Post la fondiĝo de la Ŝanhaja Esperantista Ligo, laŭ la tiama situacio ĈPEU elmetis programan sloganon “Per Esperanto por la liberigo de Ĉinio!”. La slogano koncentre spegulis la deziron de la ĉinaj esperantistoj kaj ricevis ilian varman simpatian kaj subtenon.

La Ŝanhaja Esperantista Ligo nominale estis loka grupo, sed efektive ĝi ludis rolon de tutlanda organizaĵo, ĉar ĝiaj membroj troviĝis landskale. Tiamaniere, ni disvastigis nian influon al la tuta lando prenante ĈPEU kiel kernon kaj “La Mondo” kiel propagandilon. Tiam, sub direktado de tiu slogano, aperis multaj esperantaj organizoj kaj prospera disvolviĝo prezentiĝis en la esperanta movado de Ĉinio.



Ĉinaj esperantaj periodaĵoj en la tridekaj jaroj

Ekzemple en Bejping (nun Pekino), centro de la nacisava movado de studentoj, tre vigliĝis la esperanta movado kaj nemalmultaj studentoj vizitis la esperantajn kursojn.

Krom la supre diritaj, laboroj de Proleta Esperanto-Korespondado (PEK) fare de ĈPEU estis precipe menciindaj. Ni trovis el materialoj senditaj de Internacio de Proleta Esperantistaro PEK-Bultenon. Ĝi donis al ni sugeston, ke apliko de Esperanto por raportoj novaĵojn internacie estas konkreta laboro en servo al la naciliberiga batalo. Ni eldonis monatan Ĉinan PEK-Bultenon, en kiu ni raportis al la tuta mondo politikojn de la Komunista Partio de Ĉinio por rezisti kontraŭ Japanio kaj savi la nacion, staton en sovetaĵ regionoj de Ĉinio, aktivadon de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo, vivon kaj batalon de la laboristoj kaj kamparanoj de Ĉinio kaj krimon de la japanaj agresantoj.

La novaĵoj pri Ĉinio en nia bulteno estis veraj kaj malofte troveblaj en revuoj kaj ĵurnaloj de fremdaj landoj, kaj pro tio ili estis bonvenaj por progresemaĵ esperantistoj de diversaj landoj. Ili tradukis tiujn artikolojn en sian propran lingvon kaj publikigis ilin en ĵurnaloj aŭ gazetoj de sia loko. Ekzemple, "Ruĝa Flago" de Germanio kaj "L' Humanite" de Francio publikigis niajn in-

formojn. Sovetuniaĵ esperantistoj multe tradukis niajn materialojn en sian nacian lingvon kaj publikigis ilin en lokaj ĵurnaloj aŭ murgazetoj de fabrikoj. Japanaj kamaradoj ofte tradukis niajn artikolojn en la japanan lingvon kaj eldonis ilin broŝure por disdoni ilin inter la amasoj. La japanaj militaristoj masakris ĉinajn popolanojn per aviadiloj kaj kanonoj, tamen la japana popolo montris al nia popolo simpatian kaj subtenon pere de Esperanto. Tio plene pruvis, ke la popoloj de diversaj landoj estas amikaj unuj al aliaj kaj Esperanto ĝuste estas bona ponto por interkomprenigi ilin kaj utila ilo por praktiki internaciismon.

Ni unuflanke prezentis al diversaj landoj la tiaman staton de Ĉinio, kaj aliflanke konigis al la ĉina popolo staton de aliaj landoj. Tiam en la organo de IPE "Internaciisto", "Popola Fronto" de Hispanio kaj PEK-Bultenoj de iuj landoj troviĝis nemalmultaj valoraj materialoj. Ni tradukis tiujn materialojn en la ĉinan lingvon kaj aperigis ilin en publikaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Tiam la "Monda Kulturo" redaktita de la ĉina veterana esperantisto Hujucz multfoje publikigis tiajn tradukitajn materialojn.

Poste, pro diversaj kialoj Ĉina PEK-Bulteno ĉesis aperi. Tamen daŭris la tradicio informi internacie novaĵojn per Esperanto. Antaŭ la Kontraŭjapana Rezistmilito ni publike eldonis en Sanhajo "Ĉinio Hurlas" kaj "La Radio" en Bejping. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito ni eldonis "Voĉoj el Oriento", "Orienta Kuriero" kaj "Heroldo de Ĉinio". Post la Liberiĝo ni ekaperigis la nunan "El Popola Ĉinio". Krome, ni funkciigas esperantan radiodisaŭdigon kaj eldonas esperantajn librojn.

La aktivadoj de ĈPEU jam fariĝis historiaj faktoj, tamen ĝia gvida penso, t. e. instruo de Prezidanto Maŭ Zedong preni Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucian, ankoraŭ stimulas nin antaŭen. Kompare kun tiuj de ĈPEU antaŭ pli ol 40 jaroj, multe pliboniĝis nun niaj kondiĉoj. Ni tute povas kaj devas pli efike labori por la interesoj de la popoloj de Ĉinio kaj ĉiuj landoj de la mondo per nia lingvo Esperanto.

Georfoj sub bona zorgo

de NIA RAPORTISTO

Malgranda Ĝengian

En Tangŝan mi vizitis la familion de Li Kefen, kiu laboras en policejo. Estis dimanĉo. Kiam ŝi prezentis bombonojn kaj teon por min regali, knabineto pli-ol-unu-jara alportis por mi tabureton kaj diris: "Sidiĝu, onklino!" Mi estis mirigita de la saĝeco de la infano. Tiu grasa infano kun ruĝaj vangoj kaj grandaj okuloj estis tre aminda. "Venu, ke mi brakumu vin." La

knabineto jetis rigardon al mi, sin turninte jetiĝis en la sinon de Li Kefen kaj dolĉe vokis: "Panjo."

Sed efektive Li Kefen ne estas ŝia patrino.

Li Kefen rakontis al mi pri la deveno de la infano: En la sekvanta tago post la tertremo en Tangŝan, ĈPLA-anoj elsavis tri infanojn el falintaj domoj. Unu el ili havis apenaŭ 2 monatojn. Post pridemandado, Li Kefen fine trovis paren-



Li Kefen kaj malgranda Ĝengian

cojn de la du pliaĝaj infanoj, sed neniu de la knabineto. Ŝi do adoptis ŝin kiel sian filinon kaj donis al ŝi la nomon Ĝengian. “Nia Ĝengian estas infano de la tutlanda popolo,” tion dirante kun emocio, ŝi elprenis dikan stakon da leteroj kaj du pakajojn. Post kiam la ĵurnalo *Renmin Ribao* raportis pri Ĝengian, multaj laboristoj, ŝtatoficistoj, ĈPLA-anoj kaj lernantoj de diversaj lokoj de la lando alsendis konsolajn leterojn, monon kaj objektojn. En unu el la pakajoj estis pli ol 20 paroj da diversaj ŝuetoj kaj en la alia estas brilkoloraj vestoj, ĉapoj, mantukoj kaj ŝtrumpoj. Tion vidinte mi emociiĝis same kiel Li Kefen.

Li Kefen havas 3 gefilojn, kiuj aŭ lernas en gimnazio aŭ jam ricevis laborpostenon. Ŝia familio estas feliĉa kaj senzorga, kial do ŝi prenis malgrandan Ĝengian sub sian zorgon? Li Kefen divenis mian demandon kaj diris al mi ridetante: “Malgranda Ĝengian kaj mi kune pasigis la plej malfacilajn monatojn post la tertremo, kaj mi decidis flegadi ŝin ĝis ŝi plenkreskiĝos. Tiam mi rakontos al ŝi ĉion kaj montros al ŝi la ĵurnalon kun informo pri ŝi, la leterojn kaj donacajojn


konservatajn, por ke ŝi konu socialismon kaj amu niajn Partion kaj popolon!”

En Tangŝan estas pli ol 2,700 georfoj similaj al malgranda Ĝengian. Kiel ili vivas? Por informiĝi pri tio, mi vizitis Juhong-lernejon de Ŝigiaĝuang, la ĉefurbo de Hebej-provinco, al kiu Tangŝan apartenas.

Nova hejmo

Mi venis en Juhong-lernejon en Kiaŭdong-kvartalo de Ŝigiaĝuang. En ĝia dekstra parto estas klasĉambroj, biblioteko, laboratorio kaj kuracejo, dum en la maldekstra estas dormejoj, manĝoĉambro, lavejo, barbirejo kaj banejo. En ĝi instaliĝis du infanĝardenaj klasoj, ok element-lernejaj klasoj kaj 6 mezlernejaj klasoj, kies 435 geknaboj ĉiuj loĝas en la lernejo.

Tiu lernejo estas fondita laŭ decido de la Kompartia Komitato de Hebej-provinco, speciale por geknaboj orfiĝintaj en la tertremo de Tangŝan, kaj ĉiuj elspezoj de la lernantoj estas pagitaj de la ŝtato. La popolo de Ŝigiaĝuang prenis la bonan funkciigon de tiu lernejo kiel gravan taskon komisiitan de Prezidanto Maŭ kaj la Centra



En ludo

Komitato de KPC. La tasko estis urĝa. La Laborista Politika Lernejo kaj la Dua Infanĝardeno cedis ĉiujn siajn domojn al la lernejo kiel dormejojn por la geknaboj. Nova domo kun plankareo de 3,200 kvadrataj metroj por instruado estis finkonstruita en mallonga tempo. Pli ol cent lernejoj, registaraj institucioj, fabrikoj kaj restoracioj sendis al ĝi bonajn instruistojn kaj laborantojn; virinoj de 59 loĝantaraj komitatoj faris tage kaj nokte litkovrilojn por ili; la ruĝaj gvardianoj de la Elementa Lernejo de Licun remburis centojn da kapkusenoj kaj portis ilin kantante al la lernejo; laborantoj de magazenoj liveris al ĝi ĉiajn vivbezonaĵojn inkluzive de harpingloj por la knabinoj; kaj grenvendejo kaj legomvendejo alsendis rizon, farunon, freŝajn legomojn, porkaĵon kaj ovojn.

En la 8-a de septembro de 1976, t.e. ĝuste la ĉina tradicia Aŭtunmeza Festo laŭ la luna kalendaro, geknaboj de Tangŝan venis al la nova "hejmo". Vespere, Ĝang Gianjaŭ, la unua sekretario de la Kompartia Komitato de la urbo, kaj aliaj gvidantaj kamaradoj venis al la lernejo kaj donis lunkukojn, pomojn kaj kuiritajn ovojn al la geknaboj, por ke ili ne sopiru al siaj karuloj en la festo.

Mi aŭdis ankaŭ jenan rakonton.

En la tago kiam la geknaboj venis al la lernejo, ili ĉiuj surmetis novajn vestojn, ŝtrumpojn kaj ŝuojn, sed unu el la knaboj ricevis ŝuojn, kiuj ne tre bone sidis al la piedoj. Ĝaŭ Ŝengmin, laboranto de magazeno, mezuris lian piedon kaj tuj rapidis al sia magazeno por preni taŭgajn ŝuojn. Jam restis malmulta tempo ĝis la malfermiĝo de la bonveniga kunveno por la geknaboj. Ĉar Ĝaŭ ne havis sufiĉan tempon por sendi la ŝuojn al la lernejo, li portis ilin rekte al la kunvenejo, kaj kiam la geknaboj elaŭtiĝis, li tuj trovis la knabon kaj surmetis al li la ŝuojn. La knabo kore dankis la onklon pro la bone sidantaj novaj ŝuoj kaj ĝoje kuris en la kunvenejon.

Ligiĝo de koro kun koro

Dum interparolado kun la geknaboj mi trovis, ke ili tre ŝatas sian lernejon kaj kore nomas ĝin "nia hejmo".



Dong Juguo, respondeculo de la lernejo Juhong, inter infanoj

Sed en la komenco ne tiel estis. Ĝeng Hidong, lernanto de la duajara mezlerneja klaso, rakontis al mi pri tiama vivo.

En tiu tempo, pro subita perdo de la gepatroj kaj ne-alkutimiĝo al la nova medio de la lernejo, multaj geknaboj sentis malkvieton en la animo, iuj el ili sopiris al siaj gepatroj kaj aliaj plorante postulis reveni al Tangŝan, kaj la pliaĝaj geknaboj pensis eĉ pli multe. La geknaboj terurita de la tertremo estis aparte nervozaj je ŝanĝoj en la vetero. Kiam ventis, pluvigis kaj tondris, ili timis ke denove okazos tertremo kaj kuris el la dormoĉambro kunportante la litkovrilon, kaj iuj eĉ ne kuraĝis dormi en domo. Por liberigi la geknabojn de timo, la respondeculoj kaj instruistoj akompanadis ilin kaj instruis al ili sciojn pri tertremo. La personaro de la lernejo diligente laboradas por la geknaboj. Nemalmultaj el la instruistoj manĝas kaj dormas kune kun ili. Por vekti ilian apetiton, la kuiristoj klopodis por fari bongustaĵon.

Plej ofte mi renkontiĝis kun la lernantoj en la manĝejo, en kiu estas metitaj rondaj tabletoj kaj seĝetoj. Ĉe ĉiu tablo manĝis kvin geknaboj kun bona apetito. Mi ofte vidis, ke iu viro kun aĝo de pli ol 40 jaroj iradas inter ili kaj aldonadas al ili manĝaĵojn. Li estis instruisto Ĝang Paj.

Ĝang estis instruisto de la elementa lernejo Dongfanghong de la urbo. Veninte al la lernejo

Juhong, unue li laboris kiel zorganto pri la vivo de la lernantoj. En la komenca periodo post sia alveno al la lernejo, 6-jara knabo Sun Lihua ne manĝis nek parolis. Ĝang pacience konsolis lin, manĝigis lin, lavis por li la piedojn, vizaĝon kaj vestojn kaj nokte dormis kun li en la sama ĉambro. Post kelkaj tagoj, Lihua reakiris sian naivecon kaj viklecon kaj gaje ekludadis kun la aliaj infanoj.

Nun, Ĝang estas ĉefinstruisto de iu duajara mezlerneja klaso, zorganta kaj pri la lernado kaj pri la vivo de la lernantoj. Li tre multe atentis pri moralinstruo al la geknaboj. Dank' al lia zorga laboro kaj precipe lia influado per modelaj agoj, kelkaj petolemaj lernantoj en lia klaso fariĝis bonaj lernantoj amantaj sian kolektivon. En lernado, disciplineco, pureco kaj solidareco, tiu klaso fariĝis lerninda ekzemplo.

Mi plurfoje interparolis kun la respondeculo de la lernejo Dong Juguo, kiu estas 52-jara viro serena kaj afabla. Li estis Tangŝan-ano. En la tertremo, li kaj lia edzino perdis 15 el siaj parencoj. Alveninte al la lernejo, li neniam ripozis en la dimanĉoj kaj ferioj kaj ĉiumatene balaas kaj ŝvabras kune kun la lernantoj. Ĉie kie li estas, tuj vigliĝas la geknaboj, precipe la infanoj en la infanĝardeno, kiuj konkure vokadas "Avo, avo!" tirante lian veston kaj petas lin brakumi ilin. La laborantoj en la lernejo diris, ke li estas tre bona gvidanto.

En la plej juna grupo de la infanĝardeno estis 5 infanoj. Kiam ili venis al la lernejo, la plej juna el ili havis nur 6 monatojn kaj la plej granda nur 2 jarojn. Granda ŝanĝo okazis al ili en la pasinta unu jaro. La plej juna Honghong estis eljetita de la tertremo el ĉambro de la tria etaĝo, kaj savita de ĈPLA-ano. Kiam ŝi venis al la lernejo, ŝi estis tre malgrasa kaj malforta, kaj oni timis, ke ŝi ne povos vivi longe. Guvernistinoj zorge ŝin flegadis kaj nutradis. Ŝiaj palaj vangoj ruĝiĝis iom post iom, ŝia vikleco pliiĝis kun ĉiu tago, kaj fine ŝi komencis lerni parolon. Neniu scias kiel ŝi nomiĝis antaŭe. Nun ŝi portas la nomon Dang Juhong, kiu signifas ruĝan floron kulturitan de la Partio.

Raporto al la popolo

La Tangŝan-a popolo ĉiam turnas koran zorgon al la centoj da geknaboj de Juhong-lernejo en Ŝigiaĝuang, kaj okaze de la novjaro kaj aliaj festoj la Kompartia Komitato de Tangŝan senescepte sendas delegacion tien por konsoli la geknabojn kaj distribui al ili donacajojn.

Por trankviligi la popolon en la hejmloko, en la komenco de oktobro de 1977, 40 reprezentantoj de la lernantoj gvidataj de respondeculoj de la urbo Ŝigiaĝuang kaj la lernejo revenis al Tangŝan por raporti pri sia vivo en la lernejo.

Neforgesebla estas la sceno kiam la geknaboj atingis la Tangŝan-an Fervojan Stacion. La partiaj gvidantoj de la urbo kaj subprovinco venis por ilin bonvenigi. Ambaŭflanke de la vojo svarmis homamasoj, kaj avoj kaj avinoj tirante manon de la infanoj diradis: "Bone! Bone!" kaj larmadis pro emocio.

Ĉie, kie la lernantoj estis, oni varme bonvenigis kaj akceptis ilin. Kiam ili vizitis Caŭgiakoŭ-brigadon de Guojuan-komunumo, kiu estas avangarda unuo en lerno de Daĝaj en agrikulturo, la komunumo disaŭdigis tiun novaĵon tre frue. La edzo de onklino de lernantino Ĉen Guoling alvenis de 10 kilometrojn malproksime por vidi la infanon. Kiam li vidis, ke Ĉeng Guoling grasiĝis kaj altiĝis, li diris ĝoje: "Nun mi tute trankviligiĝis!"

Eĉ pli ĝojinda estas la lernado de la geknaboj. Dank' al kuna klopodado de la instruistoj kaj lernantoj, la lernotasko plenumenda en la periodo de la tertremo estis rapide plenumita, kaj la atingoj en lernado estis altigitaj. Por stimuli la lernantojn, je la fino de ĉiu semestro la lernejo okazigis kunvenon por elekti eminentajn lernantojn kaj honori ilin per ruĝa floro kaj publikigo de iliaj nomoj en honora nomlisto.

Dum la memlerna horo ĉiuvespere, en hele lumigitaj klasĉambroj iuj el la geknaboj laŭtlegas anglan lingvon, aliaj atente faras ekzercajn taskojn, triaj skribas notojn pri la lernitaj lecionoj kaj kvaraj fervore diskutas en rondo. Ili ĉiuj diligente lernas por multe kontribui al la patrolando en la estonteco.

“Heroinoj de Jang-familio” revenis al la scenejo

de BAJ GIAMING

KARAJ legantoj, kiam vi vidas la bildon sur la kovrilo de tiu ĉi numero, supozeble vi scias, ke ĝi prezentas ĉinan tradician operon. Sed kiun operon? Kiu estas la heroino?

Ŝi estas Mu Gujĵing en la pekina opero “Heroinoj de Jang-familio”, heroino en legendo de la ĉina historio, kies rolon ludas Jang Kiuling.

La opero temas pri la familio de la fame konata generalo Jang Gije de la Norda Song-dinastio (960 — 1127 p. K.), kies 12 vidvinoj iris al la fronto kaj venkis la invadantajn malamikojn, post kiam iliaj edzoj de tri generacioj martiriĝis en defendo de la patrolando.

Mu Gujĵing estis heroino intelekta kaj lerta en batalo. Ŝia edzo Jang Zongbaŭ gardis landliman pasejon. En la tago de la 50-a datreveno de la naskiĝo de Jang Zongbaŭ, lia avino Ŝe Tajgjun kunvenigis ĉiujn familianojn por celebri lian naskiĝtagon. Subite venis malfeliĉa informo, ke Jang Zongbaŭ martiriĝis en batalo kontraŭ agreso de fremda lando. Tio portis al la familio senkomparan malĝojon. Fronte al la potenca agre-santo, okazis en la kortego disputo inter la partianoj por milito kaj tiuj por paciĝo. La maljuna heroino Ŝe Tajgjun kun venĝemo pro la patrolando kaj la familio malkaŝis la kapitulacajn partianojn per heroaĵoj de la tri generacioj de la familio Jang, unuiĝis kun la partianoj pormilitaj kaj konvinkis la imperiestron. En sia centjara aĝo ŝi akceptis la postenon de ĉefkomandan-

to, komandis la heroinojn de la familio Jang al la fronto kaj fine gajnis la militon.

La opero estas riĉa je romantika koloro. Mu Gujĵing estis legenda heroino vaste prirakontata de la popolo. Kaj hodiaŭ kamparaj komunumanoj aŭ laboristinoj ofte organizas sin en batalajn taĉmentojn nomatajn laŭ Mu Gujĵing, kiuj ludas aktivan rolon en produktado.

La lasttempe surscenigita pekina opero “Heroinoj de Jang-familio” estas prezentata de la samaj geaktoroj, kiuj ĝin ludis antaŭ 20 jaroj. Ili estas la unuaj geaktoroj de la pekina opero kulturitaj post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj spektis ilian prezentadon kaj Ĉefministro Ĝoŭ opiniis, ke tiu opero havas profundan signifon de eduko en preventado de imperiisma agresado kaj opono kontraŭ kapitulacismo, kaj instrukciis, ke oni ĝin filmigu. En 1960 kaj 1963, Ĉefministro Ĝoŭ sendis la teatran trupon al Birmo kaj Japanio por fari prezentadon tie, ke fremdlandaj amikoj konu la antikvan tradician arton de Ĉinio. Jang Kiuling ludis la rolon de Mu Gujĵing en la filmo kaj la eksterlanda prezentado.

Iun tagon, kiam mi venis al la ekzercejo de la Ĉina Pekin-opera Trupo, Jang Kiuling kaj aliaj estis provludantaj la operon “Heroinoj de Jang-familio”. Ŝiaj eminentaj kantado kaj luktarto ricevis laŭdojn de la reĝisoro Ĉeng Jikiu. Tiu ĉi diris, ke li reĝisoris la operon antaŭ 20 jaroj,

*Jang Kiuling kaj ŝia
edzo Li Gialin*



kiam tiuj geaktoroj ankoraŭ estis geknaboj, kiuj nur povis imiti prezentajn formulojn de siaj majstroj. Nun, ili prezentas pli mature kaj pli precize kaj havas pli profundan konon pri la karakteroj de la roloj. Ekzemple, en la sceno, kiam Mu Gujĵing aranĝas celebradon pri la naskiĝtago de Jang Zongbaŭ, ŝi havas plurajn sentoŝanĝojn. Komence, kun ĝojo kaj fiero ŝi pririgardis la celebran salonon; post kiam venis la informo pri martiriĝo de la edzo, ŝi dece prezentis la malĝojon de la heroino, kiu multe spertis batalojn; kiam Ŝe Tajĵjun sidiĝis ĉe la festena tablo por celebrado kaj plurfoje laŭdis sian nepon pro nescio pri la martiriĝo, Mu Gujĵing devis reteni sian malĝojon en la koro kaj sin ŝajnigi ĝoja. La ŝanĝo de la tri malsamaj sentoj estis prezentitaj klare kaj delikate. La arto de Jang Kiuling estis ne nur plialtigita sed ankaŭ disvolvita.


Jang Kiuling devenis de laborista familio. En 1950, kiam ŝi estis 13-jara, ŝi eniris la Ĉinan Teatron Lernejon. Post okjara rigora trejnado, ŝi diplomitiĝis kun elstaraj poentoj kaj fariĝis aktorino de la Kvara Ĉina Pekin-opera Trupo. Ŝiaj

bela voĉo, recitativo kaj luktarto ricevis laŭdojn de la veteranoj de la teatra rondo kaj spektatoroj.

Post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, Giang King perforte malorganizis la trupon kaj persekutis, per ĉiaj firimadoj, Jang Kiuling kiu ne volis ŝin sekvi. De tiam la opero "Herinoj de Jang-familio" estis malpermesita sursceniĝi. Post faligo de la "kvarpersona bando", Jang Kiuling revenis kun siaj sonoraj kantoj al la scenejo.

Kiam mia vizito estis finiĝonta, ankaŭ la provludo de "Herinoj de Jang-familio" venis al la lasta sceno. Mi vidis, ke giganta viro panike fuĝas sub persekutado de Mu Gujĵing. Li estis Vang Ven, la ĉefo de la agresantaj malamikoj. Tiun rolon ludis Li Gialin, la edzo de Jang Kiuling.

Kun rideto Jang Kiuling diris al mi: "Sur la scenejo ni estas malamikoj unu kontraŭ la alia. Ekster la scenejo ni estas geedzoj. Ni prizorgas kaj helpas unu la alian kaj kune progresas en la arto."



Printempo venas al Ligiang.

La fame konata rivero Ligiang estas supra parto de Gujgiang-rivero en la Guanghi-a Gŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono.

Ĝia parto inter Gujlin kaj Jangsuo, kun longeco de 83 kilometroj, estas multe laŭdata de turistoj pro siaj plej ĉarmaj pejzaĝoj.

La klara fluo de Ligiang serpentas inter kuriozaj verdaj montoj, kaj pri ĝia eksterordinara belo vivece priskribas jenaj versoj:

Kun kiom da kurbigoj la rivero Li sinuas,

Dek mil Gujlin-aj montopintoj pike staras dise.


La bordoj de Ligiang estas dekoraciitaj de diversformaj belaj montoj. Iuj el ili estas imponaj gigantoj ĉielskrapantaj, aliaj longe etendiĝas kvazaŭ graciaj dancantoj, triaj similas al brutoj kaj birdoj vekantaj asocion de diversaj ideoj.


La verdaj bambuoj plantitaj post la Liberiĝo plibeligas la riveron per siaj spegulaj figuroj en la klara fluo. La rivero sinuas, kvazaŭ verda rubando, ĉirkaŭ abruptaj montoj speguliĝantaj en la akvo. Ĉio ĉi tio kune formas vere ĉarmajn bildojn de la naturo.

La pitoreska rivero Ligiang


Naviga signal-boato








Lijiang vidita en la aereo



Mateno



Bambuoj sur la bordoj

Nokto de Gongguancun


EN nokto lampoj de Gongguancun brilas kvazaŭ sennombraj steloj.

La loko situas en la nordokcidenta antaŭurbo de Pekino. Tie troviĝas plejparto de la institutoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Etaĝdomoj staras en vicoj kaj brilaj lamplumoj filtriĝas el sennombraj fenestroj.

En frosta nokto ni vizitis kelkajn institutojn. En la laboratorio de la Instituto de Kalkula Tekniko heliĝas lamplumoj kiel en tago, flagras diversaj koloraj indikatoroj de elektronika komputero kaj bonorde funkcias la kalkulmaŝino.

La sciencaj laborantoj absorbiĝas en reguligo de nova elektronika komputero. Prezidanto Hua kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio aparte zorgas pri la disvolvo de la scienco de elektronika komputero, kio ludas gravan rolon en scienca kaj teknika modernigo. La sciencaj laborantoj de la instituto decidis rapide disvolvi la scienccon de elektronika komputero, eĉ volantas labori tage kaj nokte por regajni la perditan tempon pro subfosado de la "kvarpersona bando" de Vang Hongven, Gang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan kaj servas kiel pioniroj de modernigo de scienco kaj tekniko.

Redaktistoj de la Scienca Eldonejo de la Ĉina Akademio de Sciencoj en laboro




En ĉiuj institutoj, kien ni alvenis, regas vigleplena atmosfero.

Rigardante la lamplumojn, multaj sciencaj laborantoj, kiuj spertis zigzagan historion de nia scienca kaj teknika fronto, estis kortuŝitaj. Ili rememoris, ke en la kvindekaj jaroj la granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris alvokon marŝi al sciencoj, kaj ankaŭ tiam en Ĝongguancun brilis lamplumoj, kiuj lasis al ili neforgeseblan impreson. Sed en la tagoj, en kiuj senbride tiranis la "kvarpersona bando", estingiĝis la lamplumoj. La "kvarpersona bando" kaj ĝiaj sekvantoj en la Ĉina Akademio de Sciencoj tretis sciencan kaj persekutis sciencajn laborantojn. Tiam, se iu faris sciencan eksperimenton nokte en laboratorio, li do ne povis eviti kalumniadon pri "meto de la faka laboro super la politikon" kaj "ĉaso de renomo kaj profito". En nemalmultaj institutoj, tage oni ne faris laboron kaj antaŭtempe foriris. Vidinte ke la scienca afero de nia lando estas ruinigita, multaj homoj sentis grandan doloron en la koro. Iufoje, respondeculo de la Dinamika Instituto Kamarado Gi Bo parolis en instituta kunveno, ke en la jaro 1958 oni diligente lernis kaj peneme esplordis sub brila lamplumo. Li esperis, ke oni devas fari sciencan esploron kiel en tiu tempo. Neatendite, lia parolo estis

informita de sekvanto de la "kvarpersona bando" en la Ĉina Akademio de Sciencoj. Tiu aĉulo kriis: "Ni preferas senbrilajn lamplumetojn de socialismo ol la brilajn lamplumojn de kapitalismo." De tiam Gi Bo suferis de kalumniado kaj kritikado en grandaj kaj malgrandaj kunvenoj pro kulpigo pri restaŭro de kapitalismo. En tia atmosfero oni ne kuraĝis fari sciencan esploron en nokto. Iun profundan nokton, juna matematikisto Ĉen Gingjun estis absorbata de studo de Goldbach-konjekto. Kiam li gapis al sia kalkula rezulto, subite grupo da homoj enstrudiĝis en lian ĉambron kaj riproĉe demandis: "Kial via lampo ankoraŭ lumas en profunda nokto?" Ili suspektis, ke li estis faranta kontraŭrevolucion aktivadon!


Ĉi-foje, ni intervjuis Kamaradon Ĉen Gingjun en la biblioteko de la Matematika Instituto. Li entuziasme akompanis nin por viziti la bibliotekon kaj tre emocie diris: "La nuna atmosfero multe diferencas de tiu antaŭ frakaso de la 'kvarpersona bando'. Rigardu, nun ĝi plenas je legantoj, sed tiam en ĝi estis nur mi kaj bibliotekisto."

Post frakaso de la "kvarpersona bando", multaj sciencaj laborantoj diligente laboras tage kaj



Sciencaj laborantoj de la Instituto de Altenerĝia Fiziko de la Ĉina Akademio de Sciencoj en laboro

Fama matematikisto
Ĉen Ĝingjun laboras
absorbite.



nokte kaj estis laŭdataj de la Partio kaj la popolo. Tial lamplumoj de Ĝongguancun estas ĉiam pli multaj kaj brilaj.

La lumigado kaj estingiĝo de la lampoj de Ĝongguancun respegulis intensan batalon inter la luma kaj obskura perspektivoj de nia scienca afero. La sciencaj esploraj laborantoj profunde komprenis, ke la brilaj lamplumoj estis gajnitaj malfacile, tial ili aparte ĝin prizorgas. En la Matematika Instituto oni nokte povas vidi brilantan lamplumon el la fenestro de Hia Kiŝeng, projektanto de altklasaj tabljaj elektronikaj komputiloj “Ĉangĉeng 102” kaj “Ĉangĉeng 203”. Por kiel eble plej rapide elfari la du novajn komputilojn, tiu junulo transloĝis en la laboratorion kaj ĉiutage laboris ĝis profunda nokto; kaj en la sekvanta mateno li denove daŭrigis sian laboron, tuj post preno de manĝo, kiun lia edzino portis al li.

Por altrapide efektiviĝi sciencon kaj teknikan modernigon de nia lando, multaj sciencistoj ĉu mezaĝaj aŭ junaj klopodas por vetkuri kun la tempo, kaj iuj maljunaj sciencistoj daŭre marŝas sur la vojo de scienco. La fama matematikisto Guan Ĝaŭĝi estis ĉ. 60-jara, sed li preskaŭ ĉiu-

tage laboras ĝis profunda nokto. Kiam oni admonis lin prizorgi sian sanon, li diris: “Ĉuste pro tio, ke mia vivtempo restas ne tre longa, mi devas duoble klopodi!” La fama biologo Tong Diĝoŭ ĉiam diligente laboras sub lamplumo. Li diris: “Tempo ja signifas frukton, por sciencisto ne estas tempolimo de ok horoj, li devas kapti ĉiun minuton.”

Tiuj entuziasmaj scenoj forte kortuŝis gvidantojn de nemalmultaj institutoj. Post la 9-a horo de iu nokto, kiam la partia komitato de la Fizika Instituto finis sian kunvenon, la partia sekretario kondukis la membrojn de la konstanta komitato al ĉiuj lumigataj lokoj kaj portis al la laborantoj varmon de la Partio. Kiam ni vizitis la Fizikan Instituton ĉi-foje, li akompanadis nin pli ol du horojn. Ĉie, kien ni venis, oni entuziasme raportis al li sian laboron. En la vaporoplana kuirejo ni renkontis “kuiriston”. Oni diris, ke li estas vicestro de la instituto nove nomumita por prizorgi provizan laboron.

Jam estis nokto profunda, kiam ni forlasis la instituton. Starante sur kvieta avenuo ni trovis, ke la lamplumoj de Ĝongguancun ankoraŭ estas tiel hele brilantaj.

Diligentaj ĝardenistoj

— Notoj pri instruistoj de pekinaj elementaj lernejoj

ANTAŬ nelonge mi intervjuis kelkajn instruistojn de elementaj lernejoj kaj estis profunde impresata de tio, ke ili faris grandan klopodon sur sia ordinara kaj glora posteno, por kulturi la novan generacion de la patrolando.

Mi intervjuis instruistinon Ĝang Hjuĝaŭ de la Elementa Lernejo de Hiangĉang-strato. Jam krepuskiĝis kaj silento regis en la lernejo. Kiam mi estis adiaŭonta ŝin, grupo da lernantoj de la dua klaso venis al mi renkonte.

“Kion vi volas?”

“Vidi nian instruistinon Ĝang.”

Ili revenis al la lernejo post vespermanĝo, por ke la instruistino helpu ilin en lernado de preterlasitaj lecionoj. Kvankam Ĝang Hjuĝaŭ ne vespermanĝis, tamen ŝi iris ridetante kun la lernantoj en la klasĉambron kaj komencis sian laboron post la norma laborhoraro.

Ĝang Hjuĝaŭ laboris pli ol 20 jarojn kiel popola instruisto kaj nun jam havas la aĝon de pli ol

50 jaroj. De multaj jaroj, ŝi malofte vespermanĝis kune kun siaj familianoj. Se foje ŝi revenis hejmen iom frue, ŝiaj infanoj tuj sentas tian ĝojegon, ke ili ekkrias: “Panjo revenas! Panjo revenas!” Post vespermanĝo, Ĝang Hjuĝaŭ kutime sin okupas per korektado de ekzercoj de la lernantoj kaj preparado de instruotaj lecionoj. Kvankam ŝi jam multajn multajn fojojn instruis aritmetikan lecionon, tamen ŝi ankoraŭ serioze preparis siajn lekciajn tekstojn laŭ la novaj cirkonstancoj. Donante lecionon, ŝi observadas la mienojn de la lernantoj, por certiĝi ĉu ili atente aŭskultas kaj bone komprenas. Tiel bone ŝi plenumis sian instruadon, ke ŝiaj lernantoj dum multaj jaroj sukcese trapasis la ekzamenojn, escepte de tiuj kiuj longe malsanis.

Por Ĝang Hjuĝaŭ ne ekzistas dimanĉo, ĉar en la dimanĉoj ŝi ĉiam havas nefinfareblajn laborojn: prepari lecionon, korekti ekzercojn, fari instruajn instrumentojn, viziti familiojn de lernantoj, ktp.



Instruistino Ĝang Hjuĝaŭ interparolas kun gelernantoj.

*Instruisto Ŝi Goŭ
faras instruajn ins-
trumentojn.*



Ĉu vi povas imagi al vi, kiel statas la animo de la infanoj, kiuj komencas viziti elementan lernejon sen kunestado de la patrino? Ili sentas, ke ili venas al nova mondo. Iuj el ili estas petolemaj, aliaj silentemaj kaj timantaj fremdulojn, kaj triaj tuj ekploras je demando. Kiel multe la instruistoj devas cerbumi kaj klopodi por kutimigi la infanojn al lerneja vivo.

Dum alia intervjuo, Sun Pujan, instruistino de la Unua Elementa Lernejo de Vangfugingstrato, rakontis al mi interesajn epizodojn.

Dum leciono, ĉiuj infanoj atente aŭskultis sian instruistinon kun larĝe malfermitaj okuloj, escepte de unu el ili, kiu ne povis sidi kviete. Ĉu iu ĝenis lin? Neniu. Sun Pujan atente observis lin kaj pripensis. Ŝi iris al li kaj demandis mallaŭte: “Ĉu vi volas pisi?” La knabo kapjesis. “Iru do, kaj revenu rapide.” Daŭre iris la instruado, sed la knabo longe ne revenis. Kio okazis? Sun Pujan pensis, ke eble la knabo forgesis kunporti tualetan paperon, kaj sendis al li paperon per alia knabo. Baldaŭ la du knaboj revenis gaje. Post la leciono, Sun refoje atentigis la knabon, ke li vizitu necesejon dum paŭzo inter lecionhoroj. Ŝi ne riproĉis la knabon, ĉar ŝi sciis, ke la komencantoj de la unua klaso ne povas memori kaj fari ĉion senerare.

Por eduki la lernantojn, oni devas ami kaj bone koni ilin. Sun Pujan, laborinta dekelkajn jarojn kiel instruistino de elementa lernejo, ofte stimulas sin kaj admonas junajn instruistojn per tiuj vortoj. Foje Sun Pujan laboris kune kun lernantoj de la unua klaso. Ilia tasko estis porti rafanojn. Tio donis bonan ŝancon ne nur por kulturi la amon de la infanoj al fizika laboro, sed ankaŭ ilian kapablon de kalkulado.

“Geknaboj, kalkulu kaj memoru kiom vi portis, ĉu bone?”

“Bone!”

La lernantoj komencis portadi murmurante. Dum laborpaŭzo ili venis al la instruistino por fari raporton: “Mi portis 350!” “Mi portis 400!” Sed unu raportis, ke li portis 3,000. Sun Pujan estis mirigita. “Tri mil?” ŝi diris, “ĉu vere tiel multe?” “Do, mi portis cent!” La infano diris tiel sincere, ke oni ne povis suspekti lin pri mensogo. Kial do li tiel raportis? Sun Pujan pensadis pri tio. En la sekvanta tago, dum portado de rafanoj kun la infano, ŝi observadis, kiel li faras nombradon. La infano nombradis: “Kvindek... cent...” Kaj post kiam li nombris ĝis cent dek naŭ, li haltis. “Kiu nombro sekvas?” La infano respondis: “Ducent!” Nun Sun Pu-

juan komprenis ĉion. Estas malfacile por lernantoj en malaltaj klasoj ĝuste nombri naŭ, dek naŭ, dudek naŭ ktp plus unu. La knabo ankoraŭ ne venkis tiun malfacilon. Poste, Sun Pujuan speciale helpis lin ellerni tion. Ŝi diris: “Se oni riproĉus tian malgrandan knabon pri ‘mensogo’ sen zorga enketo, li eĉ ne scipovus senkulpigi sin! Tio povus vundi la infanon, kaj la instruisto ne devas tiel agi.”

Dum la interlecionaj paŭzoj, estas tre necese por la instruistoj iom ripozigi la lacigitajn krurojn kaj akvumi la sekan gorĝon. Sed Sun Pujuan ofte ne venas en la instruistan oficejon dum la paŭzoj, sed “ludas” kun la lernantoj, ĉar ŝi opinias, ke ŝi povas per tio bone koni ilin. Kaj dank’ al tia kunludado, ŝi informiĝis pri jena okazaĵo pri du rafanetoj.

Iutage, du lernantoj prenis po rafaneton de legomvendejo, kiam ili ĝin preterpasis, kaj survoje venis al la lernejo ĵetante la “grenadojn”. Oni eble pensus, ke tio estas nur bagatelo, kaj por tia kazo sufiĉas kelkaj malprobaj vortoj kiel kritiko. Sed Sun Pujuan ne tiel opiniis. Kian pli grandan eraron povas fari tiaj knabetoj? Ĝuste per korekto de tiaj malgrandaj eraroj, oni devas instrui la infanojn distingi pravon de malpravo kaj starigi bonajn pensojn kaj kutimojn. Ŝi diskutis kun la lernantoj pri la demando, ĉu oni devas preni la du rafanojn kaj kion oni devas fari. Ŝi kantis kun ili la kanton “La Tri Ĉefaj Reguloj de Disciplino kaj la Ok Punktoj de Atentigo”, kaj vespere ŝi vizitis la fameliestrojn de la du lernantoj. En la sekvanta tago, la du lernantoj iris al la legomvendejo kun du cendoj donitaj de la gepatroj por kompenso. “Vi estas bonaj infanoj,” ĝoje diris la vendisto, “kaj via instruisto estas vere bona popola instruisto.”

Per sia ĉiutaga morala edukado, Sun Pujuan kutimigis siajn lernantojn pensi, kiam ili ion faras, ĉu estas prave tiel agi. Eĉ la lernantoj 7-aŭ 8-jaraj jam scias, ke oni devas zorgi la ŝtatajn posedaĵojn, ke la bonaj infanoj de la Partio devas esti lernemaj, disciplinemaj kaj laboremaj, kaj ke oni devas korekti siajn erarojn, se oni tion faris. . .

Ŝi Goŭ laboras en la Elementa Lernejo de Huangcenggen kiel instruisto de komunaj scioj. Por komprenigi kaj memori sciencajn sciojn al la lernantoj, li aplikis demonstraĵajn instrumentojn en sia leciondonado. Ĉar la lernejo ne posedis sufiĉe da instrumentoj, li mem faris necesajn. Antaŭe, kiam li lernigis sciojn pri la ŝanĝo de sezonoj, la influo de sunradiado kaj rotacio de la terglobo al la sezonoj, la lernantoj montris ne bonan komprenon en siaj okuloj. Sed kiam li demonstris per la instrumento de li farita, la lernantoj ĝoje diris: “Nun mi komprenas!”

Nun mi iom parolu pri la instruado de Je Duogia, ĉinlingva instruistino de la elementa lernejo Guangning. Iutage, ŝi instruis la lecionon “Malnova Vatita Vestoj”, kiu temas pri jena okazaĵo: En frosta vintro, post kiam la amata kaj estimata Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj atingis nordan Ŝenhi post la Longa Marŝo, li portis, same kiel la ruĝarmeanoj, nur malnovan kaj maldikan vatitan veston. La teksto estas ne longa kaj enhavas nur malmultajn novajn vortojn. Sed Je Duogia multan tempon uzis por bone prepari la lekciadon, por ke la glora tradicio de la maljuna generacio de proletaraj revolucioj profunde gravuriĝu en la korojn de la infanoj kaj ili turnu sian sopiron al Ĉefministro Ĝoŭ en forton por senĉesa progreso. Ŝi studis la artikolon de Prezidanto Maŭ “Ĉiam Tenu la Laborstilon de Pena Lukto en Malfaciloj”, legis multajn kortuŝajn historiojn, faris notojn pri la instruota okazaĵo kaj skribis lekcian tekston. Por bone doni lecionon 45-minutan, ŝi uzis dekkelk-oblan tempon por studi kaj prepari. Dum la leciono, ŝi parolis kaj la lernantoj aŭskultis ĉiuj kun larmoj en la okuloj, la infanoj estis forte kortuŝitaj de la giganta figuro de Ĉefministro Ĝoŭ kaj lia nobla fideleco al la popolo. Post la leciono, iuj lernantoj komencis portadi malnovajn vestojn kaj ne lasis sian patrinon fari novajn por ili. Kaj iuj lernantoj konsciencie fariĝis ŝparemaj koncerne al elspezoj en ferioj kaj festotagoj.

Estas multaj tiaj kortuŝaj historioj pri instruistoj. Ili estas fidelaj al la eduka laboro de la Partio kaj honeste kaj diligente kulturadas la florojn de la patrolando, por la granda socialisma afero kaj la bela estonteco de komunismo.

Kanta de la juneco

(Elektitaj ĉapitroj de la romano)

(Daŭrigo)

Resumo de la antaŭaj ĉapitroj: Lin Daŭging falis sur la strandon en pluvego — ŝi tamen ne mortis. Kiam ŝi estis sin jetanta en la maron, ŝin ĉirkaŭprenis du varmaj brakoj. Ŝin savis junulo nomata Ju Jongze, kiu parolis kun ŝi pri la poemo sur la marbordo. Li estis kuzo de la lernejestro Ju Gingtang kaj studento de la Pekina Universitato hejmeveninta por pasigi la somerajn feriojn.

En la malfacila kaj danĝera momento ŝi subite renkontis lin, kiu kompatis ŝin kaj savis ŝian vivon, kvazaŭ malnovan amikon en fremda loko. Ŝi do malkaŝe rakontis al li pri sia deveno kaj travivaĵo. De tiam ili ofte promenis kune sur la marbordo kaj parolis pri literaturo kaj idealo.

Forpasis la someraj ferioj. Ju Jongze revenis al la universitato kaj Daŭging restis en Jangĝuang. Rekomendite de Ju Jongze, Daŭging povis eklabori en la vilaĝa lernejo kiel instruistino kaj per tio ŝi efektiviĝis sian idealon vivteni sin per sia laborpago. De tiam ŝia koro iom post iom kvietiĝis kaj ŝi ekinteresiĝis pri la instruado kaj infanoj.

Subite, kvazaŭ tondro en serena ĉielo, venis al Jangĝuang la informo pri ekokupo de la tri provincoj de nordorienta Ĉinio fare de Japanio en la 18-a de septembro, 1931. Indignaj amasoj eliris sur stratojn kaj ĉesis la instruado en la lernejo. Vizaĝe al la danĝero de pereado de la patrolando Daŭging pensis pri sia devo. Tiam al Jangĝuang venis junulo Lu Giaĉuan por viziti parencojn. Ankaŭ li estis studento de la Pekina Universitato kaj sciis multan veron pri batalo kontraŭ la japanaj agresantoj kaj savo de la patrolando. Daŭging estis tuj altirita de lia serena parolo kaj senceremonia konduto kaj rimarkis, ke li forte diferencas de Ju Jongze: la lasta parolis pri bela arto kaj kortuŝaj rakontoj pri amo, dum la unua bone konis ŝtatajn aferojn kaj parolis pri aferoj pri kiuj ŝi neniam aŭdis.

Post du tagoj la lernejo rekomencis lekciodon. Kun arda patriota entuziasmo Daŭging rakontis al la lernantoj la krimon de la japana imperiismo en agresado al Ĉinio kaj la nerezistan politikon de Kuomintang. Informiĝinte pri tio la lernejestro Ju Gingtang severe riproĉis ŝin kaj konflikto estiĝis inter ili. Lin Daŭging kolere forlasis Bejdajhe kaj revenis al Bejping.

Lin Daŭging ne trovis parencojn, al kiuj ŝi povis iri. Ŝi devis loĝi provizore ĉe sia bona amikino Vang Hiaŭjan. Tamen ŝi volis vivi sendepende kaj fariĝi libera homo en la socio. Ŝi do ĉie klopodis por serĉi laborojn, tamen ne sukcesis. Poste, petegite de Ju Jongze, ŝi enloĝiĝis en lian domon kaj kunloĝis kun li. La amo kaj prizorgo de Ju kontentigis ŝin, al kiu mankis amzorgo en infanaĝo. Tamen post iom da tempo ŝi eksentis maltrankvilon en la koro. Ŝi sentis premecon kaj sufokecon. Precipe ŝin ĉagrenis tio, ke Ju Jongze ne estis viro tiel perfekta kiel ŝi imagis al si, kontraŭe, li estis egoisma kaj triviala. Ho, la sorto! En kian senelirejon ĝi pelis ŝin denove! Ĉi sube estas la unua duono de la 11-a ĉapitro de la unua parto de la romano.

La Red.

XI

Estis antaŭvespero de la Novjara Tago laŭ la luna kalendaro.

Tra la per blanka papero tapetita kradfenestro de malgranda, tipe pekina ĉambro, elfiltrigis hela lamplumo kaj homa bruo. Pli ol dek gejunuloj plenigis la ĉambro, entuziasme interbabilantaj.

En la nebulo de cigareda fumo kaj vaporo, la ĉarma ridetanta vizaĝo kaj la viglaj okuloj nigre brilantaj de la mastrino Baj Liping estis aparte atentoaltiraj. Starante ĉe okpersona kvadrata tablo, ŝi levis vinglason kaj ĵetis koran rideton al ĉiu gasto.

“Ĉinokte, ni, geknaboj senhejmaj, kolektiĝas ĉi tie. Spite ke la japanaj rabistoj malpermesas nin pasigi la Novjaron kun niaj familioj, ni tamen nepre ĝuos ĝojan Novjaron Foston! He, geknaboj, trinku!”

Ŝi estis juna, kaj pluraj el la ĉeestantoj en la ĉambro aĝis pli ol ŝi, sed ŝi, prenante aspekton de pliaĝa fratino, nomadis la gastojn “geknaboj”. Ŝi naskiĝis en Gilin-provinco (en nordorienta Ĉinio) kaj estis studentino en la jura instituto de la Bejping-a Universitato. Post la Evento de la 18-a de Septembro de 1931, kiam la japanaj invadtrupoj okupis la Nordorienton, la nordorientanoj, kiuj studis en Bejping, ne plu povis rilatiĝi kun siaj familioj. Pro tio, hodiaŭ nokte ŝi invitis kelkajn samprovincanojn, universitatajn kolegojn kaj amikojn al sia pensiona ĉambro por pasigi la Novjaron. Ŝi estis knabino verva, komunikema.

Tuj kiam ŝi finis sian parolon, sin ĵetis al la tablo fortika kaj bela junulo, kun vizaĝo de sana ruĝkoloro kaj naiva entuziasmo de knabo. Li ŝiris el ŝia mano la vinglason kaj alte ĝin levis super la kapo, kriante:

“Mi protestas! En tiu ĉi antaŭnokto de Novjara Tago mi laŭte protestas kontraŭ la reakciaj Kuomintango kaj Nacia Registaro! La Ĉiang-kajŝek-a politiko de nerezisto fordonis la tri provincojn de la Nordoriento kaj enabismigis tridek milionojn da senkulpaj samlandanoj en la suferojn de la sklaveco. Mi laŭte protestas kontraŭ Nankina... Mi protestas!”

Tiu ĉi junulo estis Hju Ning, kiu, dum la veturado suden de la studentoj de la Pekina Universitato por manifestacio, voĉlegis sloganojn en la trajno. Kriante, li ĵetis seriozan ĉirkaŭrigardon per siaj duonfermitaj rondaj okuloj al la ĉeestantaro, kvazaŭ por trovi eĥojn de lia protesto. Baj Liping montris ekrideton, kun brovoj kuntiritaj, kaj donis al li baton per manplato. Ŝi diris:

“Hju Ning, stulta knabo, je kio vi blinde krias ĉi tie? Ĉiang Kajŝek ne aŭdas vian proteston. Kaj, ĉu vi ne timas, ke viaj vortoj atingus la orelojn de detektivo?... Nu, geamikoj, ne aŭskultu lin! Ni trinku!”

Tamen, la invito de la mastrino, kvazaŭ falinta en vastan dezerton, trovis atenton de neniu. Iuj indigne plendis pri la reakcio kaj nerezisto de la registaro, aliaj sentis nostalgion kaj mallaŭte ĝemspiris kortuŝitaj de la atmosfero en la ĉambro. Maldika studentino, de 17 aŭ 18 jaroj, eĉ singulte ploris, apogante sin sur la balustradeto de la lito de Baj Liping. Tio kaŭzis pli da malordo en la ĉambro. La mastrino rapidis al la studentino kaj diris al ŝi:

“Ne ploru, Cuj Hiuju! Vi pensas pri via panjo, ĉu ne? Jes, ŝi estis kruele mortigita; ni ĉiuj devas venĝi...” Kaj ŝi daŭrigis per voĉo mallaŭtigita: “Ne ploru, kara knabino! Grandnombraj estas la geknaboj kiel ni kiuj perdis sian hejmon kaj gepatrojn. Kiom multe da orfoj kaj vidvinoj kaŭzis la japanaj invadantoj! Malamo! Tiun ĉi malamoni ni ĉiuj gardos en la memoro! Aŭskultu, la volontulaj trupoj de la Nordoriento batalas kun granda aktiveco; ni certe sukcesos reiri al niaj hejmoj pli malpli frue...” Kvantkam ŝi havis pli da vivosperto, tamen, pensante pri siaj gepatroj kaj hejmtrovo troviĝantaj sub la hufoj de la invadantoj, ankaŭ ŝi ne povis sin deteni kaj, same kiel Cuj, ploris sin apogante sur la litbalustradeto.

Ĉiuj ĉesis paroli en la ĉambro.

Ĉi-nokte ankaŭ Lin Daŭging sin trovis inter la ĉeestantoj. Ŝi loĝis en la sama pensiono kaj konis Baj Liping pere de Luo Dafang, kiu estis amiko de tiu ĉi lasta kaj ofte venis ŝin viziti. Nun, en la vintra libertempo, Ju Jongze iris al sia patra hejmo por pasigi tie la Novjaron. Lin

Daŭging ne iris kun li; ŝi restis en la pensiono kaj estis invitita de la gastama Baj Liping por pasigi kun ili la novjaran antaŭvesperon.

Ŝi konis neniun alian en tiu ĉi ĉambro, krom Baj kaj Luo. Pro tio ŝi sidis en angulo kaj silente aŭskultis la parolojn de aliaj. Kiam ŝi vidis, ke Cuj Hiuju kaj Baj Liping ploras, ŝi estis kortuŝita kaj proksimiĝis al Baj. Rigardante la plorantinojn, ŝi volis diri ion, sed ne povis. La malkaŝkarakterata, babilema kaj ŝercema Luo Dafang nun sidis senvorte ĉe la fenestro, kun kapo klinita. Silentiĝis eĉ Hju Ning, kiu ĵus laŭte kriis protestojn.


“En bela festo duoblas la nostalgio.” Ho, miaj gepatroj pensas, pensas hodiaŭ nokte pri sia filo! Aminda, aminda rivero Songhua, ĉu ankoraŭ, ankoraŭ tiel ĉarme ondetas via klara akvo?” La silenton rompis ebria, singulta voĉo de malalta junulo, kun distaŭzita hararo kaj en eluzita okcidenta vesto, kiu evidente trinkis tro multe.

Ĉiuj turnis sian rigardon al li, kiu sidis ĉe la kvadrata tablo, alte tenante la vinglason en mano. Baj Liping ĉesis plori. Ekviŝinte la okulojn, ŝi saltis al li, forprenis lian glason kaj donis pinĉon al lia vango.

“Senhonta! Ĉu vi freneziĝas de ebrio, Ju Jimin?”

Sed, apenaŭ la mastrino reordigis tiun ĉi flankon, aliflanke ekaŭdiĝis veoj pli malplaĉaj al la oreloj: parolis viro de ĉirkaŭ tridek jaroj, kiu portis vatitan robon el griza ŝtofo, havis longajn falantajn harojn de dekadencisto kaj malbelan vizaĝon de azeno.

“Ve, ve, ne menciu pri la ŝtataj aferoj! Lasu pli libera la vivon! La vivo fluas kiel rivero kaj baldaŭ forpasos, ... Mi ne povas elteni, mi



ne povas elteni! Ve, la homa vivo similas al sonĝo, kiu donas plezuron nur momentan. Mi ne povas elteni, mi ne povas elteni!...”

Dum tiu ĉi persono melankolie ripetadis sian “mi ne povas elteni”, Hju Ning kaj Cuj Hiuju, pli ol ĉiuj ceteraj, vere ne povis elteni tion. Preskaŭ samtempe ili interrompis lin. Cuj Hiuju saltis al li kaj kriis kun okuloj larĝe malfermitaj, montrante per fingro lian nazpinton:

“Kiom vi trinkis, granda artisto Vang? Vi tiom ebriiĝis, ke vi jam ne plu kondukas kiel ĉino! Kia estas la nuna epoko? Nia lando estas rompita, niaj familianoj estas disigitaj! Tamen vi ankoraŭ babilaĉas tiajn dekadencajn sensencajojn! Permesu min konsili al vi per laŭta

voĉo: la japanaj rabistoj estas pretaj pereigi vian patrion, bonvolu vekigi el via ebura turo!”

Hju Ning eksvingis la manon, oratore karesplatigis siajn densajn, nigrajn harojn kaj komencis tuj sekve sian atakon:

“Bonvole vekigu, Vang Gianfu! Ĵeĥe-provinco troviĝas nun en danĝero, la tuta nordo de Ĉinio ankaŭ estas en streĉa situacio; ĉu vi tion scias? Via sinjora moŝto tamen havas humoron fari tiajn mirindajn nihilismajn parolojn!”

Kun longe etendita kolo, Vang Gianfu malvarme ridetis, rigardante al Hju Ning kaj Cuj Hiuju per siaj ebriaj okuloj, ruĝaj kaj larĝe malfermitaj. Lia embarasa aspekto, simila al tiu de frapita hundo, eksplodigis laŭtan ridon en la tuta ĉambro.

Iom poste, oni rekomencis sian babiladon.

“Eta Baj, lasu nin diri kion ni sentas en la koro! Tiu ĉi ĉambro ne devas esti tetrinkejo, en kiu estas gluitaj sur muro afiŝoj ‘Ne parolu pri ŝtataj aferoj!’.” Ju Jimin petis, ĵetante al Baj Liping ekrigardon.

Tiu ĉi ridetis kun lipoj fermitaj kaj respondis: “Mi scias, ke vi ĉiuj certe sentas multan emociion en la hodiaŭa tago. Mi ne menciis pri ĝi, ne pro tio, ke mi tion malvolis, sed pro tio, ke mi timis kaŭzi al vi malĝojon . . .” Dum la parolo ŝiaj okuloj denove malsekiĝis kaj ŝi rapide flanketurnis la kapon. Nur iom poste, kiam ŝi returnis la kapon, ŝi daŭrigis: “Post la Evento de la 18-a de Septembro, ni, gejunuloj rifuĝintaj el la Nordoriento, vivas ja vivon sufiĉe doloran. Estas necese, ke ni ĝojigu nin en novjara festo, sed ni ne sukcesis.” Ŝi iom cerbumis kaj aldonis: “Jen, mi rakontu al vi humoraĵon por vin plezurigi. Post mi, ĉiu el vi ankaŭ rakontu unu. Hju Ning, ni tamen ne permesos ke vi, knabaĉo, provoku malordon!” Ŝi grimacis per la okuloj kaj montris al la gastoj gracion ridon.

Ĉiuj najlis sur ŝi sian rigardon, kaj ŝi komencis rakonti: “Post la Evento de la 18-a de Septembro, kiam okcent mil ŝanhajaj laboristoj organizis la Asocion por Rezisto kontraŭ Japanio kaj Savo de la Nacio kaj sendis reprezentantojn al Nankino por peti, ke la registaro tuj sendu tru-

pojn kaj donu al la laboristoj pafilojn por kontraŭbatali la japanajn invadantojn, ankaŭ ni, studentoj de Bejping, atingis Nankinon por fari al la registaro de Kuomintango la saman peticion, kunagante kun la studentoj de aliaj lokoj de la lando. Tiam, jen, Ĉiang Kajŝek aplikis artifikon: li kunvokis la studentojn en la Centra Milita Akademio kaj faris al ili paroladon. Ho, aŭskultu, li diris verajn mirindaĵojn!” Baj Liping ŝatis prezenti dramojn kaj estis ludonta kiel kinostelo. Nun, per aktorina maniero, ŝi laŭte imitis la paroltonon de Ĉiang Kajŝek, strangan miksaĵon de dialektoj diverslokaj: “Nun — la registaro, estas — aktive sin preparanta — por rezisti al Japanio. Se, post tri jaroj — la perditaj teroj ne estos reprenitaj, se Ĉinio ne estos rekonstruita, oni povos dehaki —” Ŝi forte ekviŝis sian kolon per la mano kaj malfermegis la okulojn. “Oni povos dehaki mian kapon por forigi la malkontenton de la mondo!” Ŝia ekzakta imito de la tono kaj mieno de Ĉiang Kajŝek, kontraste kun ŝia ĉarma svelteco, eksplodigis rideton en la tuta ĉambro. Ridis eĉ Vang Gianfu, kiu suspiradis kun kapo klinita. Ju Jimin eĉ saltleviĝis, tenante vinglason en la mano.

“Kiu volas aŭdi lian sensecaĵon!” Hju Ning interrompis ŝin, forte frapante la tablon. “Nelonge post la parolaĉo de Ĉiang Kajŝek, studentoj el diversaj partoj de la lando veturis al Nankino por fari imponajn manifestaciojn. Kiel avangardo, la kolegoj de la Pekina Universitato entreprenis la faman manifestacion de la ‘5-a de Decembro’. Kaj sekve, studentoj el Ŝanhajo kaj Bejping amase iris al Nankino, kie kune kun studentoj de la Centra Universitato, ili ĉirkaŭis kaj detruis la sidejon de la Centra Partia Organizo de Kuomintango; ankaŭ la eldonejo de la *Centra Tagjurnalo** estis tute ruinigita. Kiam la studentoj iris al la sidejo de la Nacia Registaro kaj laŭte kriis antaŭ ĝia enirejo: ‘Kontraŭ la naciperfida registaro’, la terure timigita registaro firme ŝlosis siajn ferajn pordegojn. Tio okazis la 17-an de decembro de la antaŭlasta jaro. Ĉu vi scias?” Hju Ning subite ekŝovis sian pugnon al la azena vizaĝo de Vang Gianfu, kaj tiu ĉi

* *Organo de Kuomintango*

rapide retiris sian kapon pro timo. Ektondris denove ridegoj.

“Eta Baj, eta Hju, tre ĝojige vi parolis! Nu, en tiuj ĉi liberaj horoj de la Novjaro, ankaŭ mi ion rakontu al vi kiel posttrinkan distraĵon!” Luo Dafang, iom malvigla hodiaŭ, silentis ĝis nun; ŝajnis, ke io lin maltrankviligas. Sed kiam li komencis sian babiladon, lia mieno tuj heliĝis kaj liaj vortoj vigle torentis kiel akvo elkluzigita.

“Eta Hju, dum nia manifestacio en Nankino, vi, etulo, iris kun Lu Giaĉuan ĝui la ‘bonan trakton’. Li Mengju kondukis siajn personojn por ataki la komandojn de la urba garnizono. Ni, la restantaj 185 personoj, estis ŝnurligitaj kaj eskortitaj al Hiaŭlingvej, kie ni sate gustumis la kaptitecon. En nokto, triste ventis kaj pluvis. Ni kuŝis sur glacie malvarma tero. Ĉirkaŭe regis tomba silento. Traktataj kiel malliberuloj, kiu el ni, ĝentilaj studentoj, povis endormiĝi? Iuj kolere kunpremris la dentojn; iuj ĝemspiris; iuj, inspiritaj de poeziemo, faris improvizaĵojn... Mia moŝto, kiel vi scias, estas talenta literaturisto. Tiam, en la peza mallumo de la nokto, por malpliigi la doloron de la kolegoj, por faciligi al ili la maldormon en frostoj kaj malsato, maljuna Hju kaj mi verkis buŝajn versaĵojn. Post mallonga tempo, niaj eminentaj verkoj jam furoris inter la amaso. En la malhelo oni vokis tie: ‘Fratoj, kantu ankoraŭfoje nian *Kanton de Pekina Universitato!*’, kaj ĉi tie: ‘Bis!’. Ni ŝanĝis al koncertejo la malliberejon, la malgajan kazernon de Hiaŭlingvej. Eĉ la ora voĉo de fraŭlino MacDonald ne povus esti pli bone akceptata ol miaj vulgarej buŝaj versaĵoj.”

“Eh, eh, estimata sinjoro Luo, kiajn eminentajn verkojn vi faris? Diru al ni! Ni mortos de atendo!” La knabino Cuj Hiuju aŭskultis absorbita, kun brilaj okuloj preskaŭ ronde malfermitaj. Tre malpacienca, ŝi preskaŭ volis piedfrapi la teron, vidante, ke Luo Dafang intence kaŝas kion li verkis.

Luo Dafang brue ridegis kaj diris: “Vi estas trompitaĵoj, junuloj! Mi ne sciis verki; kaj tio, kion mi faris, estis nur simplaj vulgarejoj. Sed tiam oni senorde kriis ilin, ĉar regis ja terura

aflikto.” Li duonfermis siajn grandajn okulojn, skuadis la kapon kaj, groteske sed bravmaniere, recitis per laŭta voĉo:

“*Universitato Pekina,
Sentima, sentima!
Ni faras manifestacion,
Por savi Ĉinion!*”

Tio estas unu el ili. Alia legiĝas jene:

*‘Per ŝnuroj ligataj,
Per kolboj batitaj,
Du tagojn malsataj,
Sed restas ni spitaj!
Kun sama kuraĝo,
Eĉ en mallibera la kaĝo!
Sentima, sentima,
Universitato Pekina!’*”

(Daŭrigota)

Korespondi Deziras

* Eugeniusz Gorny, 27-j. tornisto, volas kores. kun ĉinaj amikoj kaj kolegoj. Adr.: Ratno Dolne 13, 57-411 Wambieizyce, Pollando.

* Lenio Marobin, Washington Luiz, 189, 95900-Lajeado-RS, Brazilo, kun ĉinaj esperantistoj por plibonigi la uzadon de Esp.

* Novaj esp-istoj de Centra Universitato de Esp. de Universitato Centra de Venezuelo dez. kor. kun esp-istoj ĉinaj. Adr.: Apartado 76626 Caracas 107, Venezuelo.

* Gastao Florencio, 469 Hyman Drive, Dollard Des Ormeaux, Quebec, Kanado, kun ĉinaj esp-istoj.

* Daniel Deverney, 22-j. studento, kun samaĝaj gejunuloj ĉinaj. Adr.: Chambre 309 Bâtement M, 1 avenue de la division Leclerc, 94230 Cachan, Francio.



Pekino, urbo kun longa historio

de HOŬ JENĜI kaj
ĜAŬ HJUELIANG

Pri Pekino antaŭe nia gazeto jam iom raportis. De tiu ĉi numero ni publikigos serion da artikoloj sub la nova rubriko "En Pekino" por prezenti al vi karakterizaĵojn de la antikva kaj juna urbo por ke vi konu ĝin pli bone.

— La Red.

Pekino trapasis nur 28 jarojn kiel ĉefurbo de la socialisma Ĉinio, tamen ĝi jam havas historion de pli ol 3,000 jaroj. Ĝi simbolas rejuniĝon de la antikva civilizacio. Hodiaŭ, ĝi estas la centro de politiko, ekonomio, kulturo kaj trafiko de nia lando, kaj ĉie en ĝi regas vigleco kaj juneco.

HISTORIA ĈEFURBO EN "PEKIN-GOLFO"

Pekino situas ĉe la nordokcidenta angulo de la Nord-Ĉinia Ebenaĵo. Tiu tereno estas ĉirkaŭata de montoj en la oriento, okcidento kaj nordo kaj similas al golfo. Pro tio oni nomis ĝin "Pekin-golfo". Ĝi estis trafika centro inter la Nord-


Ĉinia Ebenaĵo kaj la nordaj mont-regionoj.

Pekino estas regiono kun kompare abunda precipitaĵo en la Nord-Ĉinia Ebenaĵo. Ĝia meznombrara jara precipita kvanto estas 630 milimetroj, kaj la meznombrara temperaturo de la tuta jaro estas 11.9°C. Ĉio tio estas favora por kreskado de plantaĵoj.

La favoraj naturaj kondiĉoj, precipe la senĉesa disvolviĝo de la ĉina socia ekonomio akcelis formiĝon kaj disvolviĝon de la urbo Pekino.

Frue antaŭ 400,000 ĝis 500,000 jaroj, la ĉina simio-homo aperis jam en Ĝoŭkoŭdian-regiono sudokcidente de Pekino, nome la "Pekina Homo" fame konata tra la tuta mondo.

Pasis kelkcent mil jaroj. En la fino de la primitiva socio antaŭ ĉ. 4,000 jaroj aperis la plej fruaj kamparanoj kaj paŝtistoj en la ebenaĵo ĉirkaŭ Pekino. Ili transiris jam de la vivo de migra kolektado de manĝaĵoj kaj ĉasado al fiksloĝa vivo kaj okupiĝis ĉefe pri agrikulturo kaj paŝtado. Ili estis la pioniroj en ekspluatado de la regiono de Pekino. En la komenca periodo de



Plano de la urbo
Dadu de Juan-
dinastio

1. Palacurbo
2. Liĝeng-pordego
3. Ĝonghin-ge
4. Sonorila Turo



Kianmen — la suda pordego de la malnova urbo de Pekino

la ĉina sklava socio jam aperis la pekina primitiva tribo. Tiam Ĉinion regis Ŝang-dinastio, kiu jam inventis skriban lingvon. En la 11-a jarcento a. K., Ĝoŭ-dinastio anstataŭis Ŝang-dinastion, kaj fondis ŝtaton de evoluinta sklava sistemo. Ĝuste tiam la pekina primitiva tribo rapide disvolviĝis kaj poste fariĝis la fama urbo Ĝiĉeng. Ĝi estis la plej frua nomo de Pekino en la historia literaturo.

De la komenco de la 10-a jarcento, la politika pozicio de Pekino pli kaj pli graviĝis en la tuta lando. Liaŭ-dinastio unue prenis ĝin kiel vicĉefurbon nome Janging (aŭ Nanging). La poste leviĝinta Ĝin-dinastio oficiale prenis ĝin kiel ĉefurbon kaj alinomis ĝin Ĝongdu. Janging kaj Ĝongdu disvolviĝis surbaze de la antikva Ĝiĉeng kaj situis ĉe la sudokcidenta parto de la nuna Pekino. Krome, la dinastioj Liaŭ kaj Ĝin konstruis provizoran palacon ĉe la loko de la nuna fama Bejhaj — parko de Pekino.

En la mezo de la 13-a jarcento, Juan-dinastio konstruis ĉefurbon surbaze de la provizora palaco de Ĝin-dinastio laŭ nova kompleta projekto kaj nomis ĝin Dadu. Je la sepa jaro post la ekkonstruo de Dadu, antaŭ pli ol 700 jaroj, la fama itala vojaĝisto Marco Polo alvenis tien ĉi post longa vojaĝo. Li ricevis profundan impreson de Dadu pro ĝia grandioza skalo kaj strikte simetria lokiĝo de la konstruaĵoj kaj laŭdegis ĝin en sia turisma noto.

En la komenco de la 15-a jarcento, post pereado de Juan-dinastio, Ming-dinastio denove projektis kaj pluapase reformis la urbon kaj nomis ĝin Pekino. En la mezo de la 16-a jarcento oni alkonstruis ĉirkaŭ ĝi la eksteran muregon. King-dinastio ĝin ne ŝanĝis. Tio estis la longa evolua proceso de la antikva Pekino kaj ĝi estis konservita ĝis la fondiĝo de la nova Ĉinio. Ĝi povas esti nomata la malnova Pekino.

KREAĴO DE LA LABORANTA POPOLO

La malnova urbo Pekino estis konstruita laŭ kompleta plano karakterizita per centra aksa linio norde-sude tra la tuta urbo kun la feŭda Imperiestra Palaco sur ĝi. Ĉirkaŭ la Imperiestra Palaco troviĝis la ĉirkaŭmuro de la imperiestra urbo kaj ekster kiu estas kvartaloj enfermitaj per ĉirkaŭmuro, sude de kiu estis konstruita muro de la ekstera urbo. La centra aksa linio komenciĝas de la urbo-pordego Jongdingmen (meze suda pordego) en la sudo, trapasas norde Ĝengjangmen (meze suda pordego de la interna urbo, alinome Kianmen), Tian-anmen (suda pordego de la Imperiestra urbo), la centron de la Imperiestra Palaco, la mezan kres-ton de la arta monteto Ĝingŝan kaj finiĝas je la du grandaj majestaj konstruaĵoj Tambura Turo kaj Sonorila Turo ĉe la norda parto de la interna urbo kaj longas sume je 8 kilometroj. Sur la aksa linio en la Imperiestra Palaco staras nur la antaŭaj tri grandaj haloj, kiuj simbolis la potencon de la feŭda imperiestro, kaj la postaj tri grandaj haloj por ĉiutaga aktivado de imperiestro, dum la aliaj konstruaĵoj estis simetrie lokitaj ambaŭflanke de tiu linio. Krome, ankaŭ la ĉefaj temploj ekster la Imperiestra Palaco, ekzemple la templo por kulti la prapatrojn de la imperiestro (nun la Kultura Palaco de Laboruloj), la templo por kulti la teran kaj grenan diojn (nun Ĝongŝan-parko) ĉe la orienta kaj okcidenta flankoj de Tian-anmen, la Ĉiela Altaro por kulti la ĉielon (nun Tiantan-parko) kaj la templo por kulti agrikulturan dion (nun sporta stadiono) ĉe la orienta kaj okcidenta flankoj norde de Jongding-pordego, ĉiuj estis simetrie lokitaj ambaŭflanke de tiu linio.



La norda kvartalo vidita sur Gingshan

De la projekto de la malnova urbo de Pekino ĝis la palacaj kaj templaj konstruaĵoj ĉiuj forte predikis "aŭtokratecon" de la feŭda imperiestro. En tio oni povas vidi kian gradon atingis la rigoreco de la imperiestra regado en la ĉina feŭda socio.

Sed, oni ankaŭ povas vidi, ke brilan antikvan kulturon kreis laboruloj sub la kruela regado de la feŭda aŭtokrateco. Laŭ historia literaturo, antaŭ pli ol 550 jaroj, sole la diversaj majstraj metiistoj partoprenintaj en la konstruado de la Imperiestra Palaco jam nombriĝis je cent mil. La salonoj, haloj kaj temploj konservitaj en Pekino kun alta arta valoro, ĉiuj estis kreitaj, de la projektado ĝis la

konstruado, de laboruloj. Ili plene montras la altajn saĝon kaj talenton de la laboranta popolo.

Sed, ni ankaŭ devas vidi, ke la kruela feŭda regado nepre vekis kontraŭstaron ĉe la kamparanoj. Frue en la komenco de la 15-a jarcento, kiam oni komencis konstrui la Imperiestran Palacon, sudĉiniaj kamparanoj disvolvis intensan batalon kontraŭ arbhakado por la imperiestro. Dum la centoj da jaroj post la finkonstruo de la Imperiestra Palaco, okazis, laŭ literaturo, centoj da kompare grandskalaj bataloj de kamparanoj kontraŭ feŭda subpremado kaj ekspluatado. En la historio, kamparana insurekcia armeo okupis la urbon Pekino kaj la Imperiestran Palacon. Pro

manko de nova klasa forto kaj gvido de avangarda partio, iliaj insurekcioj fiaskis unu post alia. Sed la kamparanaj revoluciaj bataloj certgrade skuis la feŭdan regadon kaj puŝis la disvolviĝon de la socia produkta forto.

Post la falo de la feŭda dinastio, la malpermesita placo antaŭ Tian-anmen-pordego fariĝis loko por manifestacioj de revoluciaj amasoj kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, de tie ekbrulis la flamo de la nova demokratia revolucio.

LA POPOLA ĈEFURBO EN ANTAŬENMARŜO

Je la 31-a de januaro, 1949, en hurado de amasoj la urbo Pekino liberiĝis, la nova demokratia revolucio, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kun Prezidanto Maŭ Zedong kiel la ĉefo, gajnis la finan venkon post longa malfacila batalado kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. Je la 1-a de oktobro samjare, Prezidanto Maŭ solene proklamis sur Tian-anmen-pordego al la tuta mondo la fondiĝon de la Ĉina Popola Respubliko. Tio markis la komenciĝon de la nova epoko de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. La antikva urbo kun historio de pli ol 3,000 jaroj tiam komencis sian novan vivon.

Pekino fariĝis popola ĉefurbo, kie estas la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Prezidanto Maŭ tie kunvokis kaj prezidis multajn gravajn kunvenojn de la Partio kaj la ŝtato, gvidis la ĉinan popolon en socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj iniciatis la Grandan Proletan Kulturitan Revolucion. Li intervidiĝis tie kun gastoj el diversaj partoj de la mondo kaj senĉese disvolvis amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.

En la pasintaj 28 jaroj, la fizionomio de Pekino multe ŝanĝiĝis. La placo antaŭ Tian-anmen jam fariĝis vasta popola placo. En ĝia centro staras la Monumento de la Popolaj Herooj, kaj ambaŭflanke, la grandiozaj Popola Halo kaj la Muzeo de la Ĉina Historio kaj la Ĉina Revolucio. En la jaro 1977, oni konstruis sur la placo la Memorialon de Prezidanto Maŭ. La Imperiestra Palaco en la centro de la urbo jam fariĝis muzeo por fari klasan edukon al la popolaj amasoj. La antaŭa aksa linio reganta la urban planon hodiaŭ jam montriĝis ne tiel okulfrapa kaj anstataŭ ĝi aperis nova aksa linio kun reala signifo. La nova linio etendiĝas de la Tian-anmen-placo orienten kaj okcidenten trapasante novajn kvartalojn. Ĝi estas la plej larĝa avenuo Ĉang-an-strato kaj grava trafika linio tra la tuta Pekino.

En la malnova socio, la luksaj konstruaĵoj de la palaco superis ĉiujn aliajn konstruaĵojn de la tuta urbo. Nun, novaj konstruaĵoj en la urbo delonge rompis la antaŭan limon de alteco kaj novaj altaj domoj aperis ankaŭ ekster la urbo. En la novaj kvartaloj senĉese aperas novaj domoj kaj novaj stratoj. La malnovaj urbomuregoj ĉirkaŭ la antikva Pekino jam estas forigitaj, sur ilia bazo kaj ĉirkaŭ la urbo oni konstruas du novajn avenuojn, ambaŭflanke de kiuj oni konstruis multajn domojn. La totala areo de domoj nove konstruitaj de Pekino en la pasintaj pli ol 20 jaroj estas pli ol duoblo de tiu de la malnova Pekino. Ambaŭflanke de ŝoseoj, ĉirkaŭ loĝejoj, kaj en kvartaloj de fabrikoj oni plantis multajn arbojn. En varma somero Pekino aspektas pli bela pro la grandega nombro da verdaj arboj.

Hodiaŭ, la plej eminentaj antikvaj konstruaĵoj de Pekino ĉiuj estas konservataj, ili jam akiris sian novan vivon kaj fariĝis konsistiga parto de la popola ĉefurbo.

En la feŭda socio, kiam Pekino iom post iom disvolviĝis en politikan centron de la tuta lando, ĝi komencis fariĝi granda konsumo centro. Nun, tia stato jam estas tute ŝanĝita. Kun la disvolviĝo de la nacia ekonomio, Pekino paŝon post paŝo disvolviĝis en relative kompletan industrian bazon de fero kaj ŝtalo, petrola kemio, ilmaŝinoj kaj mezuraj instrumentoj, kaj ankaŭ la antaŭurba agrikulturo multe disvolviĝis.

Pekino nun estas ankoraŭ en senĉesa reformado, konstruado kaj disvolviĝo. Ĝi ne nur havis longan historion, sed ankaŭ havas pli belan estontecon!

Nove konstruita Ĝianguomen-strato





La antikva ceramiko de Ĉinio

de LI GIJAN

En la neolitiko de nia lando (8,000 ĝis 2,000 jaroj a.K.), en la homa vivo jam estis fajencaĵoj. La plej antikva el la lokoj de la neolitika kulturo de nia lando estas tiu de Hemudu en Jujaŭ-gubernio de Ĝegiang-provinco. Ĝi havas historion de 7,000 jaroj. En tiu tempo oni uzis fajencaĵojn grizajn kaj ruĝajn kaj malmulte da koloraj fajencaĵoj. La loko de la Jangŝaŭ-a kulturo ĉe Banpo-vilaĝo de la urbo Hi-an de Ŝenhi-provinco estas unu el la plej fruaj lokoj de la neolitika kulturo en la norda parto de Ĉinio. Antaŭ pli ol 6,000 jaroj, la matriarka klana socio sin trovis en sia prospera periodo, en kiu oni jam faris belajn kolorajn fajencaĵojn. Tio montris, ke kreado de ceramikaĵoj komenciĝis pli frue.

MITO PRI ELTROVO DE CERAMIKO

Kiel ceramiko estis eltrovita? En nia lando cirkulis jena antikva mito:


Antaŭ tre tre longa tempo, Huangdi, la ĉefo de la triboj en la baseno de la Flava Rivero, tenis ĉe si du homojn, kiuj speciale zorgis pri faro de vivbezonaĵoj instrumentoj. Unu el ili nomiĝis Ning Fengzi. Li laboris diligente kaj ofte iris al diversaj lokoj por koni la faradon de ĉiaj vivbezonaĵoj instrumentoj. Li tre ŝatis fari fajencaĵojn. Sed en longa tempo li ne povis sukcese baki argilajn objektojn. Iun tagon, kiam li estis bakanta fajencaĵojn, iu eksterordinara


preterpasanto haltis kaj diris al li: "Vi hejtas mallerte kaj ne povas bone regi la bruladon!" Ning Fengzi diris: "Prave vi diris, bonvolu min instrui!" La preterpasanto, suprenvolvinte la manikojn, kaŭris kaj instruis al Ning Fengzi kiel ekbruligi, enmeti brullignon kaj regi la bruladon. Tiu homo estis tre lerta en bakado. Dank' al lia helpo elbakiĝis tre belaj fajencaĵoj. Li foriris, post kiam Ning Fengzi ellernis la teknikon. Ning Fengzi estis tre serioza en bakado, li persone iris en la bakujojn por observi bruladon kaj estis brulmortigita en la bakujo. Oni enterigis lin sur monto. Poste kiam oni bakis argilajn objektojn, oni povis vidi lin en la flamo de la bakujo.

En la unua jarcento a. K. la granda literaturisto kaj historiisto Sima Kian de Ĉinio notis en sia verko "Historia Kroniko", ke Huangdi nomumis Ning Fengzi kiel oficiston por zorgi pri produktado de ceramikaĵoj. La mito konservis ian spuron en si pri la eltrovo de ceramiko en prahistoria epoko. Kiu estis tiu, kiu instruis al Ning Fengzi bakadon de argilaj objektoj? Sendube estis la laborularo, kiu havis praktikan sperton kaj vere kreis ceramikon.


Inter la ideogramoj gravuritaj sur bronzaĵoj kultaj vazoj uzataj de la nobeloj en la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio komencita je la 11-a jarcento a. K. jam troviĝis "taŭ", kiu signifas "fajencan" aŭ "fajencan".

Boatforma kruĉo eltrovita en Ŝenhi





Pelvo kun fiŝdesegno elterigita ĉe Hi-an



Pelvo kun homvizaĝa desegno elterigita ĉe Hi-an

Iu verko de la Periodo de Militantaj Regnoj (403-221 a. K.) detale notis pri la farado de fajencoj; tiam farado de fajencoj jam fariĝis aparta profesio. Familioj, kiuj faris fajencaĵojn de generacio al generacio, prenis la vorton "taŭ" kiel sian familian nomon. Alia libro "Jiĝouŝu" notis anekdotojn pri la fama tribestro Sennongŝi en la legenda periodo. Ĝi diris ke li persone kulturis teron kaj faris fajencojn kune kun membroj de la klanoj.

FAJENCO-FARADO KAJ AGRIKULTURO HAVAS SAME LONGAN HISTORION

La fajencaĵoj estas kaj vivbezonaĵoj objektoj kaj metiartaĵoj. La eltrovo de fajencaĵoj rezultigis el disvolviĝo de la sociaj produktaj fortoj.

Post kiam la homaro eniris en la neolitikon, la agrikulturo kaj brutobredado ricevis unuapaŝan disvolviĝon. Tiam oni jam havis kompare fidindan kaj ĉiam pli riĉan fonton de manĝaĵoj. Pro tio la bezono de ujoj por kuirado kaj konservado de manĝaĵoj fariĝis pli kaj pli urĝa. Tiu objektiva bezono postulata de la socia vivo puŝis

homojn krei fajencaĵojn. La stabileco kaj altiĝo de vivo akcelis generadon de la loĝantaro, tiel ke parto de homfortoj de la socio povis esti uzata por farado de fajencaĵoj. Ili montris sian artan kreivon en la formoj kaj ornamaĵoj de la fajencaĵoj.

La vivo de fiksa loĝado estis necesa kondiĉo por krei fajencaĵojn. Fajencaĵoj estas facile rompeblaj kaj maloportunaj por transportado. Tial la migrantoj sen fiksa loĝado ne povas eltrovi metodojn por fari fajencaĵojn, nek povas multe uzi ilin. Ekzemple, la nomadaj olunĉunoj de nordorienta Ĉinio ne sciopovas fari fajencaĵojn.

En la longtempa praktiko de agrikultura produktado, oni iom post iom konis la gluecon kaj modleblecon de argilo, oni sciis ke ĝi povas esti moligita per akvo kaj ŝmirita sur korbon kaj knede transformita en diversajn formojn kaj vazojn. El la akumulita sperto de longtempa uzado de fajro, oni certgrade konis ke fajro povas ŝanĝi la karakteron de materio. La homo ankaŭ akumulis sperton pri regado de fajro. La aplikado de fajro akcelis la procedon de batalo de la homaro kontraŭ la naturo kaj ankaŭ helpis la homaron en eltrovo de ceramiko.

Pro apliko de malsamaj metodoj de bakado, la fajencaĵoj estas en ruĝo, grizo kaj nigro. Krome troviĝas ankaŭ blankaj fajencaĵoj faritaj el blanka argilo. Plej multenombra estas la ruĝaj kaj grizaj fajencaĵoj, kaj ĝis nun ankoraŭ estas vivbezonaĵoj. La aliaj estis iom post iom forlasitaj en disvolviĝo de la socia produktado kaj la vivo.

KOLORAJ FAJENCAĴOJ — ARTAJ TREZOROJ

El la antikvaj fajencaĵoj de nia lando la plej allogaj estas la koloraj fajencaĵoj, sur kiuj oni faris diversajn desegnojn kaj bildojn en ruĝo, bruno, nigro, blanko k.a. Primitivaj kulturaj lokoj produktantaj kolorajn fajencojn troviĝas tra la tuta lando. Arkeologoj trovis diversajn belajn kolorajn fajencaĵojn en antikvaj kulturaj lokoj. Inter ili ofte vidiĝis manĝi'oj kaj vazoj por konservado de greno kaj ĉerpado de akvo.

La pentraĵoj sur la koloraj fajencaĵoj ĝenerale konsistas el desegnoj kaj bildoj. La antaŭaj estas ĉefe imitaĵoj de plantoj kaj geometriaj figuroj. En longtempa kolektado de manĝeblaj plantoj kaj agrikultura laboro, oni konis multajn plantojn,

kies belaj aspektoj tre plaĉis al ili. Oni artisme kreis diversajn desegnojn de plantoj. La branĉoj, folioj, petaloj kaj semoj simetrie pentritaj sur fajencaĵoj formis diversajn belajn desegnojn. Ankaŭ la desegnoj de geometriaj figuroj estis multaj. Laŭ la karakterizaĵoj de la aspekto de certaj objektoj oni kreis desegnojn ondoformajn, paraleliniajn, cirklaĵajn, kradaĵajn, segildentaĵajn kaj V-formajn, per kiuj oni projektis diversajn belajn ornamaĵojn. Iuj desegnoj enhavas apartan signifon. Ekzemple, grandaj rondoj en fiŝreta desegno montras ke fiŝkaptistoj kuntiras la reton, kaj fiŝoj kun grandaj okuloj baraktas en la reto. Tiuj ornamaĵoj kaj aliaj bildoj de ŝnuroj, ledaĵoj, plektaĵoj k. a. pri ĉiutaga vivo montris la amon de tiamaj homoj al la naturo kaj vivo.

En la ornamaĵoj de koloraj fajencoj sin trovas bildoj kun gran-

da arta valoro similaj al la tradiciaj pentraĵoj de Ĉinio. Estis bildoj pri galopanta cervo, starantaj aŭ flugantaj birdoj, longvosta akvobirdo tenanta fiŝon en la beko kaj granda fiŝo kun malfermita buŝo por engluti ion. Iu bildo prezentas ridetantan homan vizaĝon kun pintaj ornamaĵoj sur la kapo, gajaj okuloj, longaj kaj maldikaj brovoj kaj granda buŝo, ĉe kies anguloj estas po unu fiŝeto. Ŝajne tiu homo dormas kaj sonĝas, ke amaso da fiŝoj naĝas al li. La bildo saturita per vivetoso montras, ke la membroj de fiŝkapta klano ĉiam deziris riĉan rikolton en fiŝado. Oni povis krei tiel belajn realismajn verkojn, nur post atenta observado de pozoj kaj movoj de animaloj en longtempa produkta aktivado.

Metiistoj de fajencoj, lerte prenis partojn de objektoj kiel modelojn en


farado de akcesoraj partoj de la plej fruaj koloraj modlaĵoj de nia lando. Ekzemple, oni modlis homkapon sur la kovrilo de iu objekto kiel ĝian tenilon. La kapo kun ornamaĵo sur ĝi havas rondajn vangojn, okulojn rigardantajn antaŭen, ridetantan buŝon, kies anguloj iom supren kurbiĝis, kaj maldensan barbon sur la mentono. Ĝi impresas per afableco kaj vikleco. Aliaj fajencaĵoj surhavas tenilojn en formoj de birdo, agla kapo, geko k.a. Tiuj vivecaj artaj figuroj donis vivecon al la fajencaĵoj.

La buntaj fajencaĵoj estas unu el la trezoroj de niaj antikvaj kulturo kaj arto. Ili montris senkomparan kreivon de la prauloj de la diligenta kaj saĝa ĉina nacio. Ili ankaŭ estas gravaj materialoj por esplori la historion de la primitiva socio, belarto kaj metiarto de nia lando.

Kolora fajenca poto



Desegnoj sur kolora fajenca pelvo





Noto pri vizito al Irano

de HJU BOJUAN

IRANO, Persujo en antikveco, estas lando kun historio de pli ol 2,500 jaroj. Brilan antikvan civilizacion la diligenta kaj saĝa persa popolo kreis. Persujo situas en grava loko de trafiko inter Eŭropo kaj Azio, kaj granda kvanto da kulturaj kaj historiaj restaĵoj spegulas la viglan interflumon de ekonomio kaj kulturo inter orientaj kaj okcidentaj landoj en antikveco.

En la jaro 1977, mi transpasis, kun la Arkeologia Delegacio de Ĉinio, la Pamir-an Altebenaĵon per aviadilo, kaj faris amikan viziton al Irano.

Laŭ la perfekta aranĝo de D-ro Firouz Bagherzadeh, ĝenerala direktoro de la Irana Centralo de Arkeologia Esploro, ni vizitis multajn historiajn lokojn de antikva kulturo de Irano, el kiuj, la ruinoj de la antikvaj palacoj de Persepolis en Fars-provinco estas unu el la fame konataj ĉefverkoj. Akompanate de D-ro Shahbazi, direktoro de la Instituto por Achaemenid-Esploro, kiu vizitis Ĉinion, ni rigardis la ruinojn de la grandiozaj antikvaj ŝtonaj konstruaĵoj kaj grandajn ŝtonajn skulptaĵojn.

Starante antaŭ la ruinoj de konstruaĵoj, ni vidis multajn ŝtonajn kolonojn kaj murojn. La palaco konstruita el ŝtonoj sub monto vizaĝe al ebenaĵo okupis areon de 140,000 kvadrataj metroj, kaj estis bruligita de Aleksandro la Granda,

reĝo de Macedonio, en la 4-a jarcento a. K. La brila konstruaĵo spegulis la atingojn en arta kreado de la laborantaj popoloj de okcidenta Azio kaj norda Afriko.

Ni suriris la 110 ŝtonajn ŝtupojn antaŭ teraso de la palaco. Traspasinte ĝin ni eniris grandiozan portalon de la palaco. Tie ni vidis du kolosajn ŝtonajn reliefojn de flugilhavaj animaloj kun homa kapo. Ne nur iliaj grandecoj kaj la formoj estas samaj, sed ankaŭ la linioj sur ili estas tiel similaj, kvazaŭ ili estus spegulaĵoj unu de la alia. Enirinte korton de la palaco, sur la ŝtonaj muroj norde kaj okcidente de la aŭdienco salono ni vidis du reliefojn pri luktado de leono kun bovo. La akompananta irana amiko diris, ke ili simbolas "luktadon inter lumo kaj mallumo", la leono simbolas lumon, forton kaj potencon, kaj la bovo mallumon, ĉar la lasta havas lunoformajn kornojn. En la meza salono de la siatempe plej grandioza halo, origine estis 36 ŝtonaj kolonoj, el kiuj nur kelkaj ankoraŭ majeste staras, kaj pri la ekzisto de la ceteraj atestas nur la ŝtonaj bazoj. Ili altas je ĉirkaŭ 20 metroj kaj sur iliaj suproj estas skulptitaj ŝtonaj animaloj kaj ĉiu el ili pezas je pluraj tunoj. Oriente de ili, ni vidis elfositajn restaĵojn de du grandaj haloj kun po cent kolonoj. El tio oni povas vidi, kiel grandioza estis la tuta konstruaĵaro!

En la tagoj de nia vizitado al Irano, iranaj amikoj parolis pri la historia fakto, ke Arsaces-dinastio unuafoje sendis ambasadoron al Ĉinio en akompano de ĉina ambasadoro. Laŭ historia verko de Ĉinio, en la posta parto de la dua jarcento a. K., Imperiestro Vudi de Han-dinastio sendis Ĝang Kiang al la okcidento, kaj la vicestro de lia ambasado vizitis la regnon Parthia kaj estis solene akceptita de ĝia reĝo, kiu ordonis 20,000 rajdantojn al la orienta limo por akcepti la gastojn. Post tio, la reĝo sendis, al Ĉinio, ambasadoron kun grandaj ovoj de birdo por donaco kaj magiistojn. Tio estis la komenco de kontakto inter la du landoj. Poste, malfermiĝis la "silka vojo" trapasanta Iranon kaj disvolviĝis ankaŭ la surmara trafiko tra la Hinda Oceano kaj la Persa Golfo. La du landoj faris longtempan interkonaktan de ekonomio kaj kulturo.

En la Muzeo de Ornama Arto en Teherano, ni ĝoje trovis la influon de tia interkontakto en iranaj artaĵoj. Inter la ekspoziciaĵoj estis bronza spegulo de la 12-a jarcento p. K., kun belaj desegnoj de nuboj karakterizantaj antikvajn bronzaĵojn de Ĉinio. Iranaj amikoj diris, ke en Gorgan, oni trovis ankaŭ du bronzaĵojn imite partiajn laŭ tiuj de Han-dinastio de Ĉinio. La akompanantaj iranaj amikoj haltis antaŭ delikata pentraĵo kaj atentigis la ĉinajn gastojn: "Jen, pentraĵo kiel simila al la

ĉinaj!” Sur la pentraĵo vidiĝas maljunulo ripozanta sub arbo kun birdoj, ĝia stilo tre similas tiun de la tradiciaj pentraĵoj de Ĉinio. Ĝi spegulas la striktan interrilaton pri pentrarto inter la du landoj.

Iun tagon, post vizito al la restaĵo de antikva urbo Rey, ni ripozis ĉe kampadejo de la loka arkeologia taĉmento apud kiu troviĝis granda morusarbo. Iu amiko el la taĉmento diris, ke la kulturado de morusarboj, la bredado de silkraŭpoj kaj la metodoj de malbobonado de kokonoj kaj silkteksado de Irano devenis de Ĉinio. En antikveco, silkaĵo estis la ĉefa varo eksportita de Ĉinio al Persujo. La produktado de silkaĵoj de Persujo rapide disvolviĝis kaj oni kreis novon. Ĝi grandkvante produktis brokaton kaj eksportis ĝin al Ĉinio. Tia originala teksaĵo interesis la teksistojn de Ĉinio kiuj teksis, laŭ iliaj metodo kaj desegnoj, “persan brokaton”.

Ni vizitis ankaŭ la Arkeologian Muzeon de Irano, kiu estas la plej malnova en tiu lando. En ĝi estas aparta ekspoziciejo por elmontri porcelanaĵojn de Ĉinio. Inter la ekspoziciaĵoj estis pli ol 40 grandaj porcelanaĵoj kun bluaj desegnoj fabrikitaj de Gingdeĝen en Juandinastio (1279 — 1368 p. K.). En la lasta tempo, iranaj arkeologoj elterigis grandan kvanton da ĉinaj porcelanaĵoj en Hormuz-insulo en la Persa Golfo. Oni diris, ke tiuj porcelanaĵoj estis kovritaj de maldika tavolo da tero kaj facile elterigitaj. Iu irana amiko, kiu iam laboris ĉe la elfosejo de Hormuz, montris al mi fragmenton de porcelanaĵo, sur kiu estas ĉinaj ideogramoj signifantaj: fabrikita en Ming-dinastio. Doktoro Negahban, fame konata irana arkeologo kaj estro de la Literatura Fakultato de la Teherana Universitato, diris sprite: “En la persa lingvo, oni

nomas porcelanaĵojn ‘ĉini’, kiu signifas ‘ĉina’. Nun, ni nomas ĉiujn porcelanaĵojn ‘ĉini’, kie ajn ili estis fabrikitaj.” Ĉiuj ekridis pro lia rimarkigo.

Ankaŭ la irana kulturo estis frue disvastigita al Ĉinio kaj havis vastan influon. Iu specialisto de la Ŝtata Biblioteko de Irano kun granda intereso parolis al la ĉinaj vizitantoj pri la kultura interrilato inter Ĉinio kaj Irano en antikva tempo. Li elprenis libron pri vojaĝo de fremdulo en la 14-a jarcento p. K., en kiu oni skribis: La estro de Hangĝoŭ-subprovinco “ordonis sian filon akompani nin en ekskurso”, “sur la ŝipo estis muzikistoj kaj kantistoj, kiuj kantis ĉinajn, arabajn kaj persajn kantojn”, “la mastroj laŭdis la persajn kantojn. Ĉiufoje kiam oni kantis persan kanton, ili bisadis.” La irana amiko diris ekscitiĝe: “Kiel ne ordinara afero estas, ke antaŭ 600 jaroj en Ĉinio jam cirkulis persaj kantoj!”

En la VI-a Arkeologia Jarkunveno de Irano, Hia Naj, estro de la Ĉina Arkeologia Delegacio, faris sciencan raporton “Pri la Objektoj de la Persa Sassanid-periodo Lastajare Elterigitaj en Ĉinio”, kaj

montris ke multaj persaj arĝentaj moneroj, orajoj, arĝentaĵoj kaj pecoj de persa brokato estis trovitaj laŭlonge de la “silka vojo” en okcidenta Ĉinio kaj ĉe ĝia suda marbordo. Li ankaŭ parolis pri la epigrafo en la han-a kaj pahlavi-lingvoj, sur tomoŝtono de persa virino, elterigita en Hi-an de Ĉinio. Laŭ la epigrafo, la familia nomo de la virino estis “Ma” en la han-lingvo, kaj ŝia edzo, nomita “Su Liang”, estis perso servanta kiel oficiro de la Tang-dinastia armeo. Mehrdad Pahlbod, ministro de arto kaj kulturo de Irano, diris al la ĉina delegacio: “De antikveco jam troviĝas intensa kultura interrilato inter niaj du landoj. Nun, ni esperas plie disvolvi la interrilaton de longa historio.”

Vespere de la 4-a de novembro, ni forlasis Teheranon per aviadilo por reveni al la hejmlando. Kiam ni rigardis malsupren tra luko de la aviadilo al la iluminita urbo, ni kvazaŭ denove aŭdus la laŭdojn de la iranaj geamikoj pri la longtempa kultura interrilato inter la du landoj. Nun, la antikva “silka vojo”, kiu ligis Ĉinion kaj Iranon, dissendas novan brilon kaj fariĝis nova vojo de amikeca interrilato.

La ĉina arkeologia delegacio vizitas historian kulturen lokon de Irano akompanate de iranaj amikoj.



Nove Ricevitaj Libroj

Interlingvistika Informa Servo (jarkolekto 1977) estas jarkolekto de la kvaronjara bulteno de Societo por Internacia Lingvo. Ĝi estas la 20-a en la serio, do gratulinda pro la senlaca kaj konstanta laborado oferita. La jarabono por la bulteno kostas 10.50 germanajn markojn aŭ 15 internaciajn r. k. La jarkolekto mem nur 2.10 g. m. aŭ 3 internaciajn r. k. Red. kaj adm.: Schaumanns Kamp 126, D—2057 Reinbek, Germana Federacia Respubliko. Poŝtĉeka konto: Hamburg n-ro 29153-202.

Esperanto-dokumentoj (nova serio)

N-ro 8: La lingva problemo en la Eŭropa Komunumaro

9: Esperanto kaj la pliaĝuloj

10: Esperanto: ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?

La lasta n-ro temas pri tre interesa demando, kiu estas grava por nia movado kaj estas ankoraŭ malmulte pristudita. Oni certe legos kun intereso kaj profito.



Lokoj menciitaj en artikoloj de tiu ĉi numero

1 *Jiangsu*-provinco

2 *Ŝigiaĝuang*



Lastatempe multaj el niaj legantoj, en siaj leteroj aŭ resenditaj demand-folioj, donis siajn opiniojn pri "El Popola Ĉinio" inkluzive de laŭdoj, proponoj kaj kritikoj. Al

ili ni esprimas ĉi tie nian koran dankon. Iliaj favoraj vortoj estas kuraĝigo por ni, dum iliaj proponoj kaj kritikoj same signifas apogon al nia laboro. Responde al la amikeco de niaj legantoj ni volonte faros nian eblon por plibonigi nian redaktadon.

Jene estas parto de la skribaĵoj supremenciitaj.

— La Red.

S-ro H. A., Nederlando:

Mi ĵus ricevis la decembran numeron de EPC. Ege plaĉis al mi la artikolo de s-ro Hujucz. Mi pensas ke tio estas ege konsilinda maniero por verki artikolojn: unuflanke pritrakti ĉinan historion, aliflanke

ligi tion al personaj travivaĵoj de esperantistoj ĉinaj. Cetere mi ĉiam kun intereso legas la ĝeneralajn informojn pri via lando, kiun mi iam esperas viziti. Tamen la novaĵoj priesperantaj kiel pri la U.K. estas ankaŭ tre celtrafaj en ĝuste EPC.

Mi estas sciencisto en la instruada kampo, kaj min interesas regulaj komunikoj pri la eduka kaj instrua evoluo en via lando.

S-ro C. C., Francio:

Pri la enteno de via revuo mi konsideras tre bona, ĉar en nia malproksima lando ni certe ŝatas esti informita pri la okazintaĵoj de la nova Ĉinio. Ni bone komprenas, ke Ĉinio marŝas rapide al progreso sur ĉiuj kampoj, eligante la antikvan mizeron dank' al la unueco de pluraj centoj da milionoj da loĝantoj. Tio estas la frukto de penega, kuraĝa laboro pro la organizo de la lando.

Miaparte mi diras al vi, ke mi estas maljunulo 82-jara, kaj mi certe diras al tiuj maljunuloj kiuj ankoraŭ laboras kaj al la junuloj

en la plena forto de la aĝo: kuraĝe daŭrigu por la nobla entrepreno de la progreso kaj por la feliĉo de la tuta popolo.

S-ro A. E., Germana Federacia Respubliko:

Kun granda plezuro mi legas vian gazeton kaj penas ekkoni la kaŭzojn de la progreso de la popolo ĉina. Tial mi ŝatas la artikolojn pri teknikaj problemoj, pri produktado, el tio rekonante kiajn sukcesojn la homoj atingis en tiu ĉi lando. Ankaŭ la informo pri arto tre interesas.

Mi lernas ekkoni la psikan forton de la popolo, kaj admiras tiun ĉi tiel, ke mi havas la deziregon unufoje vojaĝi al Ĉinio.

S-ro M. H., Francio:

Pri la revuo mem mi opinias, ke ĝia enhavo povus pliboniĝi, ke ĝia populareco povus multe kreski se vi dediĉus pli da paĝoj al nuntempaj problemoj (malpurigado de la vivmedio, popolaj interŝanĝoj, lingva problemo en internaciaj rilatoj, ktp) kaj solvoj (ekz.: sunenergio kaj rimedoj por ĝin ekspluati, reuzado de ruboj, informado pri ekologio, ktp).

Mi opinias, ke la lasta numero de la jaro 1977 estas pli bona ol la antaŭaj, kaj mi esperas, ke vi pli bone komprenas kion deziras scii aŭ legi la aliaj popoloj.

S-ro J. S., Danlando:


Plej mi ŝatas la rubrikon "El ĉina moderna historio", ĉar ĝi ofte

rakontas pri la faroj de la eŭropanoj, de kiuj unu estas mi. Vi devus tute ŝanĝi la enhavon de "ĉinaj naciecoj". En ĝi mi prefere legus pri la kutimoj, dancoj, manĝaĵoj, ktp, ne pri kiel ili fartis antaŭe kaj nun (tion vi ja bone prilumis en artikoloj). Almenaŭ la enhavo estu ne nur pri antaŭ la revolucio kaj poste.

Plej bona kaj impresiga bildo de Tian-anmen-placo finfine aperis en EPĈ 1977/12. Tiu mankis!

La gajaj desegnaĵoj de Guo Liang (ekz.: "Pentristeto") nun mankas, bedaŭrinde, al EPĈ.

Mi interesiĝas pri la reformo de la han-a skriba lingvo.



LA FERVOJA STACIO DE GENGIANG FINKONSTRUITA

La nomita stacio situas okcidente de la urbo Gengiang de Giangsu-provinco kaj estis oficiale ekuzita en la 5-a de januaro 1978.

La stacio en la formo de W estas majesta, originala kaj riĉa je loka koloro. Ĝia centra turo kun granda horloĝo ĉe la supro altas je 28

metroj. La suba parto de la turo estas halo, ĉe kies ambaŭ flankoj estas pasaĝeraj atendejoj.

Gengiang situas ĉe la trafika kruĉo de la suda kaj norda partoj de Giangsu. La nova stacio plie favoras al la pasaĝeroj kaj transportado de industria kaj agrikultura produktaĵoj de la 33 gubernioj de kvin subprovincoj.

DU PROFUNDAJ ANKREJOJ DE LIANJUNGANG-HAVENO EKUZITAJ

Lianjungang-haveno de Giangsu-provinco finkonstruis du profundajn ankrejojn de ŝtalplataj fostoj, kaj lastatempe ili estis ekuzitaj. Tiuj ankrejoj ekipitaj per ĉinaj instalaĵoj, kun longeco de 378 metroj, estas projektitaj de nia lando por ankri 10,000-tonelajn ŝipojn. La haveno situas en la meza parto de nia marbordo kaj estas ĉefa mara haveno de la nordaj Giangsu,

Anhuj, centra kaj nordokcidenta Ĉinio. En la lastaj 3 jaroj, ĝi konstruis kaj plivastigis tri profundajn ankrejojn kaj unu mezgradan ankrejon, kiuj multe altigis ĝian kapablon. Post finkonstruiĝo de tiuj du ankrejoj, en la haveno povas esti samtempe ankritaj pluraj 10,000-tonelaj ŝipoj.


PORCELANA REFLEKTILO DE ASTRONOMIA TELESKOPO

La Ziginŝan-a Observatorio de la Ĉina Akademio de Sciencoj unufoje muntis al sia teleskopo porcelanan reflektilon projektitan kaj faritan de niaj sciencaj laborantoj, kaj per ĝi faris klarajn fotojn de la luno, Saturno kaj Jupitero.

La reflektilo estis sukcese projektita kaj farita de Jang Ŝigie, vicĉefingeniero de la observatorio, kaj la provfabrika grupo sub lia gvido, kun helpo de koncernaj institucioj. Ĝia diametro estas 60 centimetroj.



Wuhan



WUHAN

- ★ Pekino
- Wuhan


Vuhan estas la ĉefurbo de Hubej-provinco. Ĝia nomo estas mallongigo de la urbotrio Vuĉang, Hanjang kaj Hankaŭ. La fervoja pontego super Jangzi-rivero ĉe Vuhan ne nur interligas tiujn urbojn sed ankaŭ unuigas la fervojajn liniojn de suda kaj norda Ĉinio. De antikveco, Vuhan estas centro de tera kaj akva trafikado kaj grava strategia loko. La Insurekcio de Vuĉang akcelis la Revolucion de 1911.

Vuhan estas moderna industria urbo kun rapide disvolviĝantaj industriaj branĉoj de fero kaj ŝtalo, maŝinoj, kemiaĵoj, tekstilaĵoj kaj manĝaĵoj. La Vuhan-a Fera-Ŝtala Kompanio estas unu el la tri grandaj feraj-ŝtalaj bazoj de nia lando.

Dank' al konstruado de pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo, la fizionomio de tiu urbo jam multe ŝanĝiĝis. En la nove konstruitaj stratoj kaj industria kvartalo oni plantis multajn arbojn. La pejzaĝaj lokoj kaj parkoj de la urbotrio altiras al si grandajn nombrojn da promenantoj per siaj belajoj.

La pitoreskaj lokoj ĉirkaŭ la Orienta Lago de Vuĉang kun monteto ĉirkaŭata de akvo, elegantaj kioskoj kaj aliaj konstruaĵoj ornamaj estas ĉiam belaspektaj pro siaj fruktaroj kaj multaj florplantoj verdaj en ĉiuj sezonoj.

Starante sur alta loko, oni povas vidi, ke la vojoj, fabrikoj, loĝdomoj kaj parkoj sur la bordoj de Jangzi-rivero kaj ĝia branĉo Hanŝuj estas en densaj arbaroj aŭ borderitaj de forstozonoj.





La Orienta Lago



Alia angulo de la Orienta Lago


Parko ĉe la Orienta Lago





Koridoro de la Orienta Lago en vintro

La Vuhan-a Universitato



*Kelkaj personoj
en la pekina
opero
"Heroinoj de
Jang-familio"*



Ŝe Tajgjun, kiu fariĝis ĉefkomandantino en la centjara aĝo



Koŭ Ĝun kaj Vang Huj

Onklino la Sepa

Vang Ven



Kore ĝojas diversnaciecaj geknaboj

Bildoj de Liu Bingiang
Vortoj de Hu Ĝenhua



Konkure

Konkure kuras jen bicikloj,
geknaboj tajaj kore ĝojas:
por venko de 1' revolucio,
ĉiam antaŭen ili vojas.



Ĉasistetoj

Ni ĉiuj estas ĉasistetoj
vigle agantaj en montaro;
ni ĉiujn lupojn, kiel ajn ru-
zajn,
mortpafos certe sen eraro.

Montgrimpado

Ĉelte tenante ruĝan flagon ni grimpadas
monton,
kaj ĉiupaŝe kreskas ĝojo en la tuta
koro;
montsupre vidas ni pejzaĝon belan en
la rondo,
hodiaŭ novajn kampojn havas ĉie jaŭ-
popolo.



Rajdkonkurso


Sur la Altebenaj' Pamira
konkursas jen knabar' taĝika,
por vidi, kiu rajdas lerte,
kaj kiu estas pli fortika.

Teksto de
Ki Fang


Bildoj de
Fang Fang



1. Iutage, la elefanto venis al sia kampo kaj rimarkis ke malaperis la karotoj kulturitaj de li.



2. "Ĉu vi forprenis miajn karotojn?" li demandis al la simieto. La lasta skuis sian kapon kaj montris al la malgranda sciuro, kiu plukis frukton de sur arbo.



3. "Mi ne prenis," diris la sciuro. "Panjo diris al mi, ke bona infano ne prenas alies objektojn."




4. La elefanto denove demandis al la simieto, kaj tiu ĉi diris: "Kredeble la pando ĝin forprenis." Tiam la pando diris: "Mi ne volas karoton. Mi plej ŝatas bambuajn foliojn kaj bambuidojn."



5. La erinaco, sciuro kaj pando ĉiuj maltrankviliĝis kaj volis doni helpon al la elefanto por solvi la problemon.



6. Ili diris, ke la simieto estas frandema kaj maldiligenta, do certe li formanĝis la karotojn. La elefanto diris: "Tion ne diru nun. Ni unue faru enketon."



7. Foje, la malgranda erinaco gardis kaŝtanojn. Li saltis en la pelvon kaj kuntiriĝis tiel, ke li aspektis kiel vera granda kaŝtano.



8. Baldaŭ venis la simieto. Li prenis la grandan kaŝtanon kaj ĝin metis en sian buŝon.



9. Li pensis, ke la granda kaŝtano certe estas tre dolĉa, kaj ne atendis, ke la malgranda erinaco forte saltadis en lia buŝo kaj tiel forte lin pikis, ke li kriadis.



10. Vidante la simieton en tia embaraso, ĉiuj lin demandis: "Ĉu ne estis vi, kiu forprenis la karoton?" La simieto ne plu kuraĝis mensogi.



11. La elefanto kritikis la simieton: "Se vi eraris, vi devas konfesi vian kulpon kaj ne miskulpiĝi aliajn."



12. La simieto tiel hontiĝis, ke li kaŝis sian vizaĝon per mano. Kaj nun li ankoraŭ ekkaŝas sian vizaĝon per mano, kiam li vidas homojn.

875 v

